

Preludo

Verkis Katherine Mansfield; tradukis Brian Fox

1

Ne ekzistis centimetro de spaco por Ĉarlota kaj Kezia sur la kaleŝo, kaj, kiam Patriko svingis ilin al la supro de la pakaĵoj, ili ŝanceliĝis; la sino de la avino estis plena kaj Linda Burnell tute ne povis teni bulon de infano sur sia sino dum ia distanco. Isabela, tre supera, sidis apud la nova faktoto sur la koĉera benko. Valizoj, sakoj, kaj skatoloj amasiĝis sur la planko. “Tiu estas absolutaj necesaj, kiujn mi ne lasos el mia vido dum unu momento,” diris Linda Burnell, kaj ŝia voĉo tremis per laco kaj ekscito.

Ĉarlota kaj Kezia staris sur la peco de gazono tuj interne de la ĝardeno pordo tute pretaj por la tumulto, en siaj jakoj, kun latunaj ankraj butonoj kaj etaj rondaj ĉapoj kun batalŝipaj rubandoj. Mane-en-mane, ili fiksrigardis per rondaj solenaj okuloj, unue la absolutajn necesajn, kaj poste sian patrinon.

“Ni simple devos postlasi ilin. Jen tio. Ni simple devos flanken meti ilin,” diris Linda Burnell. Stranga eta rido flugis el ŝiaj lipoj; ŝi dorsen klinis sin kontraŭ la butone havaj, ledaj kusenoj kaj fermis la okulojn; ŝiaj lipoj tremis per ridado. Feliĉe tiumomente S-ino Samuelo Josephs, kiu jam rigardis la scenon de malantaŭ sia salona latkurteno, anserpaŝas laŭ la ĝardeno pado.

“Kial ne lasu la infanojn kun mi por la posttagmezo, S-ino Burnell? Ili povos iri sur la platĉaro, kun la butikisto, kiam li venos en la vespero. Tiu ajtoj sur la pado devas iri, ĉu ne?”

“Jes, ĉio ekster la domo nepre iru,” diris Linda Burnell, kaj ŝi svingis blankan manon al la tabloj kaj seĝoj, kiuj staris per siaj kapoj sur la antaŭa gazono. Kiel absurdaj ili aspektis! Aŭ ili staru inverse, aŭ Ĉarlota kaj Kezia ankaŭ staru per siaj kapoj. Kaj ŝi sopiris diri: “Staru per viaj kapoj, infanoj, kaj atendu la butikiston.” Ŝajnis al ŝi, ke tio estus tiom ĝojige komika, ke ŝi ne povis atenti al S-ino Samuelo Josephs.

La dika malrapida korpo apogis sin sur la ĝardeno pordo, kaj la granda gelatena vizaĝo ridetis. “Vi ne ĉagrenu, S-ino Burnell. Ĉarlota kaj Kezia povos manĝi kun miaj infanoj en la infana ĉambro, kaj mi poste kontrolos ilin sur la platĉaron.”

La avino konsideris. “Jes ĝi vere estas ĝuste la plej bona plano. Ni estas tre dankemaj al vi, S-ino Samuelo Josephs. Infanoj, diru ‘dankon’ al S-ino Samuelo Josephs.”

Du mildaj pepoj: “Dankon, S-ino Samuelo Josephs.”

“Kaj estu bonaj knabinetoj, kaj – venu proksimen –” ili antaŭeniris, “ne forgesu diri al S-ino Samuelo Josephs, kiam vi volas. ...”

“Ja, Avinjo.”

“Ne ĉagrenu, S-ino Burnell.”

Je la lasta momento Kezia maltenis la manon de Ĉarlota kaj impetis al la kaleŝo.

“Mi volas ree adiaŭ-kisi mian avinon.”

Sed ŝi tro malfruis. La kaleŝo forruliĝis laŭ la vojo, Isabela ŝvelis per fiero, ŝia nazo supren al la tuta mondo, Linda Burnell sternis sin, kaj la avino serĉfosis inter

la tre kuriozaj diversaĵoj, kiujn ŝi jam metis en sian nigran silkan retikulon je la lasta momento, por io por doni al sia filino. La kaleŝo trembrilis for en la sunlumo kaj fajna oreca polvo, kaj supren trans la monteton. Kezia mordis sian lipon por ne reagi, sed Ĉarlota unue zorge trovis la poŝtukon, tiam ploregis.

“Panjo! Avinjo!”

S-ino Samuelo Josephs, kiel granda varma nigra tekruĉa mufo, brakumis ŝin.

“Estas en ordo, mia kara. Estu kuraĝa infano. Vi venu kaj ludu en la infana ĉambro!”

Ŝi metis sian brakon al ĉirkaŭ ploranta Ĉarlota kaj kondukis ŝin for. Kezia sekvis, farante vizaĝaĉon al la lumba fendeto, kiu estis malferma kiel kutime, de S-ino Samuelo Josephs, dum el ĝi pendis du longaj ruĝetaj korsetaj laĉoj. ...

La plorado de Ĉarlota moderiĝis, kiam ŝi supreniris laŭ la ŝtuparo, sed ŝia aspekto ĉe la infana ĉambra pordo, kun pufaj okuloj kaj bula nazo, donis kontenton al la S-J-oj, kiuj sidis sur du benkoj antaŭ longa tablo, kovrita per lakto kaj surmetita per vastaj teleroj de pano kaj bake gutinta graso, kaj du brunaj kruĉoj, kiuj pale vaporis.

“Hola! Vi ploris!”

“Ho! Viaj okuloj tre eniris.”

“Ĉu ŝia nazo ne aspektas stranga.”

“Vi estas tute ruĝe makula.”

Ĉarlota estis vera sukceso. Ŝi sentis tion kaj ŝvelis, timeme ridetante.

“Venu kaj sidu apud Sadia, katido,” diris S-ino Samuelo Josephs, “kaj Kezia, vi sidu ĉe la fino apud Moseo.”

Moseo larĝe ridetis kaj pinĉis ŝin dum ŝi eksidis; sed ŝi ŝajnis, ke ŝi ne rimarkis. Ŝi ja malamamis knabojn.

“Kion vi deziras?” demandis Stano, klinante trans la tablo tre ĝentile, kaj ridetante al ŝi. “Kiun vi deziras por komenci – fragojn kun kremo aŭ panon kun bake gutinta graso?”

“Fragojn kun kremo, mi petas,” diris ŝi.

“Aha-ha-ha.” Kiel ĉiuj ridis kaj frapis la tablon per la kuleretoj! Kia trompo! Ĉu ne! Li ja superruzis je ŝi! Brave Stano!

“Panjo! Ŝi kredis, ke estis reale!”

Eĉ S-ino Samuelo Josephs, kiu verŝis lakton kaj akvon, ne povis alie ol rideti. “Vi devas ne moki ilin en ilia lasta tago,” ŝi anhelis.

Sed Kezia mordis pecon el sia pano kun bake gutinta graso, kaj tiam starigis la pecon sur sia telero. Sen la mordaĵo ĝi faris ian karan pordon. Puf! Ne gravis al ŝi! Larmo promenis laŭ ŝia vango, sed ŝi ne ploris. Ŝi ne ploru antaŭ tiuj teruraj anoj de familio Josephs. Ŝi sidis kun klinita kapo, kaj dum la larmo gutis, ŝi kaptis ĝin per sia lango kaj manĝis ĝin antaŭ ol iu el ili rimarkis.

2

Post vespermanĝo Kezia vagis reen al ilia propra domo. Malrapide ŝi marŝis supren laŭ la malantaŭaj ŝtupoj, kaj tra la vazlavejo en la kuirejon. Nenioj restis tie krom bulo de sableca flava sapo en unu angulo de la kuireja fenestro-breto kaj peco da flanelo makulita per vestlaveja bluaĵa sako en alia. La fajrejo

pleniĝis per rubo. Ŝi agitis ĝin per fajrostango, sed trovis nenion krom harara tenilo kun kora pentraĵo, kiu iam apartenis al la servistino. Eĉ tion ŝi lasis kuŝi kaj vagis tra la mallarĝa pasejo en la salonon. Oni jam tiris la latkurtenon malsupren sed ne fermite. Longaj faskoj de sunlumo briladis, kaj la onda ombro de ekstera arbusto dancis sur la orecaj linioj. Nun ĝi estis senmova, nun ĝi ree flagris, kaj nun ĝi venis preskaŭ ĝis ŝiaj piedoj. Zum! Zum! Kalifora muŝo frapis kontraŭ la plafono; la tapiŝaj najloj tenis pecetojn de ruĝa lanugo.

La manĝoĉambra fenestro havis kvadraton de kolora vitro ĉe ĉiu angulo. Unu estis blua kaj unu estis flava. Kezia klinis sin por gajni unu pluan rigardon al blua gazono kun bluaj floroj de arumo kreskantaj ĉe la ĝardeno pordo, kaj tiam al flava gazono kun flavaj floroj kaj flava barilo. Dum ŝi rigardis, eta ĉineca Ĉarlota elvenis sur la gazanon kaj komencis senpolvigi la tablojn kaj seĝojn per angulo de sia antaŭtuko. Ĉu tio vere estis Ĉarlota? Kezia ne estis tute certe, ĝis kiam ŝi rigardis tra la ordinara vitro.

Supre en la gepatra ĉambro ŝi trovis ujon por piloloj, nigran kaj brilan ekstere, kaj ruĝan interne, tenante vatan bulon.

“Mi povus teni birdan ovon en tio,” ŝi decidis.

En la ĉambro de la servistino troviĝis korseta butono fiksita en fendo de la planko, kaj en alia fendo, kelkaj globetoj kaj longa kudrilo. Ŝi sciis, ke estis nenio en la ĉambro de la avino; ŝi observis, kiam ŝi pakis. Ŝi transiris al la fenestro kaj apogis sin kontraŭ ĝi, premante la manojn kontraŭ la vitro.

Kezia kontentis tiel stari antaŭ la fenestro. Ŝi ŝatis la senton de la malvarma brila vitro kontraŭ siaj varmaj polmoj, kaj ŝi ŝatis observi la strangajn blankajn suprojn, kiuj venis al la fingroj, kiam ŝi forte premis ilin kontraŭ la vitro. Dum ŝi tie staris, la tago fine flagretis kaj mallumo venis. Kun la mallumo rampis la vento snufante kaj hurlante. La fenestroj de la malplena domo skuiĝis, grincado venis el la muroj kaj plankoj; peco de malfiksa ondolado sur la tegmento krakis mizere. Kezia subite estis tute senmova, kun larĝe malfermitaj okuloj kaj kunpremitaj genuoj. Ŝi timis. Ŝi volis voki al Ĉarlota kaj daŭre vokis dum ŝi kuris malsupren kaj el la domo. Sed Ĝi estis tuj malantaŭ ŝi, atendante ĉe la pordo, ĉe la supro de la ŝtuparo, ĉe la malsupro de la ŝtuparo kaŝante sin en la pasejo, preta por elflugi ĉe la malantaŭa pordo. Sed ankaŭ Ĉarlota estis ĉe la malantaŭa pordo.

“Kezia!” ŝi gaje vokis. “La butikisto ĉeestas. Ĉio estas sur la platĉaro; kaj tri ĉevaloj, Kezia. S-ino Samuelo Josephs jam donas al ni grandan ŝalon por porti ĉirkaŭ ni, kaj ŝi diras, ke vi butonu vian jakon. Ŝi ne eksteren venos pro astmo.”

Ĉarlota estis gravulo.

“Nu do, vi infanoj,” kriis la butikisto. Li kroĉis siajn grandajn poleksojn sub iliaj brakoj kaj supren svingis ilin. Ĉarlota aranĝis la ŝalon “plej bele” kaj la butikisto nestis por iliaj piedoj per peco de malnova litkovrilo.

“Levu piedojn. Ne hastu.”

Ili povus esti paro da etaj ĉevaloj. La butikisto provis la ŝnurojn, kiuj tenis sian ŝarĝon, kaj malkroĉis la bremsan ĉenon de la rado, kaj fajfante, li supren svingiĝis al apud ili.

“Restu proksime al mi,” diris Ĉarlota, “ĉar, alie, vi tiros la ŝalon for de mia flanko, Kezia.”

Sed Kezia grade moviĝis ĝis la butikisto. Li altis apud ŝi, granda kiel giganto, li odoris de nuksoj kaj novaj lignaj skatoloj.

3

Estis la unua fojo, ke Ĉarlota kaj Kezia iam ajn estis eksterhejme tiom malfrue. Ĉio aspektis malsame – la farbitaj lignaj domoj, pli malgrandaj ol dum la tago, la ĝardenoj pli grandaj kaj sovaĝaj. Brilaj steloj punktis la ĉielon kaj la luno, pendante super la haveno, plaŭdigis la ondojn per oro. Ili povis vidi la briladon, el la lumturo sur Insulo Kvaranteno, kaj la verdajn lumojn sur la malnovaj ŝipaj korpoj.

“Jen venas la pramo por Picton,” diris la butikisto, montrante al eta vaporŝipo, tute ornamita per brilaj globetoj.

Sed kiam ili atingis la supron de la monteto kaj komencis malsupren iri ĉe la alia flanko, la haveno malaperis, kaj kvankam ili ankoraŭ estis en la urbeto, ili tute perdiĝis. Aliaj ĉaroj klakade pasis. Ĉiuj konis la butikiston.

“Nokton, Fred.”

“Bonnokton,” li kriis.

Kezia tre ŝatis aŭdi lin. Kiam ajn ĉaro distance aperis, ŝi levis la okulojn kaj atendis lian voĉon. Li estas malnova amiko; kaj ŝi kaj la avino jam ofte iris al liaejo por aĉeti uvojn. La butikisto loĝis sole en dometo, kiu havas forcejon, kiun li mem konstruis, kontraŭ unu muro. Unu bela vito etendiĝis kaj kovris trans la tuta forcejo. Li prenis ŝian brunan korbon de ŝi, tegis ĝin per tri grandaj folioj, kaj tiam li palpis en sia zono por eta tranĉilo, supren etendis la manon kaj fortondis grandan bluan grapolon kaj kuŝigis ĝin sur la foliojn tiom tenere, ke Kezia retenis la spiron por observi. Li estis tre granda viro. Li portis brunan veluran pantalonon, kaj li havis longan brunan barbon. Sed li ne portis kolumon, eĉ ne dimanĉe. La dorso de lia kolo sunumis brile ruĝe.

Ĉiujn kelkajn minutojn, iu el la infanoj ripete demandis, “Kie ni nun estas?”

“Nu, jen Falka Strato, aŭ Ĉarlota Arkstrato.”

“Kompreneble ĝi estas,” Ĉarlota starigis la orelojn je la lasta nomo; ŝi ĉiam sentis, ke Ĉarlota Arkstrato apartenas speciale al ŝi. Tre malmultaj personoj havas straton kun la sama nomo, kiun ili havas.

“Rigardu, Kezia, jen estas Ĉarlota Arkstrato. Ĝi aspektas malsama, ĉu ne?” Nun ili postlasis ĉion konatan. Nun la granda platĉaro klakadis en nekonatan regionon, laŭ novaj vojoj kun altaj argilaj deklivoj ĉe ambaŭ flankoj, supren sur krutaj, krutaj montetoj, malsupren en veprajn valojn, tra larĝaj, malprofundaj riveroj. Pluen kaj pluen. La kapo de Ĉarlota svingiĝis; ŝi velkis, ŝi glitis duone sur la sinon de Kezia kaj kuŝis tie. Sed Kezia ne povis sufiĉe malfermi siajn okulojn. La vento blovis kaj ŝi froste tremis; sed ŝiaj vangoj kaj oreloj brulis.

“Ĉu la steloj iam ĉirkaŭen bloviĝas?” ŝi demandis.

“Ne, ke oni rimarkas,” diris la butikisto.

“Ni havas geonklojn. Ili loĝas proksime al nia nova domo,” diris Kezia. “Ili havas du filojn, la pli aĝa nomiĝas Filipo, kaj la pli juna nomiĝas Ĉifono. Li havas virŝafon. Li devas nutri ĝin per emajla tekruĉo kun ganto sur la defluilo. Li montros ĝin al ni. Kio estas la diferenco inter virŝafo kaj ŝafino?”

“Nu, virŝafo havas kornojn kaj ĝi sturmas al oni.”

Kezia konsideris. “Mi ne ege volas vidi ĝin,” ŝi diris. “Mi malamas sturmantajn bestojn kiajn hundojn kaj papagojn. Mi ofte sonĝas, ke bestoj sturmas al mi – eĉ

kameloj – kaj dum ili sturmas, iliaj kapoj ŝvelas grande-ege.”

La butikisto diris nenion. Kezia rigardis supren al li tra duonfermitaj okuloj. Tiam ŝi etendis fingron kaj karesis lian manikon; ĝi sentiĝis hare. “Ĉu ni estas proksimaj?” ŝi demandis.

“Ne multe for, nun,” la butikisto respondis. “Fariĝas lace?”

“Nu, mi ne estas eĉ iomete dormema,” diris Kezia. “Sed miaj okuloj daŭre volviĝas en ia stranga maniero.” Ŝi longe suspiris, kaj por ĉesigi la volviĝon de la okuloj ŝi fermis ilin. ... Kiam ŝi ree malfermis ilin, la ĉaro klakis laŭ alira vojo, kiu tranĉas tra la ĝardeno kvazaŭ vipa atako, subite irante ĉirkaŭ insulon de verdaĵo, kaj malantaŭ la insulo, sed preter la vido ĝis oni atingas ĝin, estis la domo. Ĝi estas longa kaj malalta kun kolonraj verando kaj balkono tute ĉirkaŭe. Ĝia mola blanka amaso kuŝis sternita sur la verda ĝardeno kvazaŭ dormanta besto. Kaj jen unu, jen alia el la fenestroj eklumis. Iu promenas tra la neokupataj ĉambroj portante lampon. El malsupra fenestro la lumo de fajro flagretis. Stranga bela ekscito ŝajne fluis el la domo en tremantaj ondetoj.

“Kie ni estas?” diris Ĉarlota, rekten vekigante. Ŝia marista ĉapo estis tute sur unu flanko kaj sur ŝia vango estis la premaĵo de ankra butono, kontraŭ kiu ŝi premis dum dormo. Tenere la butikisto levis ŝin, ĝustigis ŝian ĉapon, kaj rektigis la ĉifitajn vestojn. Ŝi staris kaj palpebrumis sur la plej malsupra veranda ŝtupo, observante al Kezia, kiu ŝajne venis flugante tra la aero al siaj piedoj.

“Ho!” kriis Kezia, ĵetante la brakojn supren. La avino venis el la malluma vestiblo, portante etan lanternon. Ŝi ridetis.

“Vi trovis la vojon tra la mallumo?” diris ŝi.

“Perfekte bone.”

Sed Ĉarlota ŝanceliĝis sur la malsupra veranda ŝtupo kiel birdo falinta el la nesto. Se ŝi starus senmove dum momento, ŝi ekdormus; se ŝi apogis sin kontraŭ io, la okuloj fermiĝus. Ŝi ne povis marŝi per plua paŝo.

“Kezia,” diris la avino, “ĉu mi povas fidi al vi porti la lanternon?”

“Jes, mia avino.”

La maljunulino klinis sin malsupren kaj donis la brilan spirantan aĵon en ŝiajn manojn kaj tiam ŝi prenis al ebria Ĉarlota. “Ĉi tien.”

Tra kvadrata vestiblo plena de sakegoj kaj centoj da papagoj (sed la papagoj estis nur sur la tapeta papero), laŭ mallarĝa pasejo, kie la papagoj persiste flugis preter Kezia kun ŝia lanterno.

“Estu silentaj,” avertis la avino, kiu lasis al Ĉarlota stari sur la piedoj kaj malfermis la manĝoĉambran pordon. “Kompatinda eta patrino aĉe suferas kapdoloron.”

Linda Burnell, en longa kana seĝo, kun la piedoj sur kuseno kaj plejdo trans la genuoj, kuŝis antaŭ kraketanta fajro. S-ro Burnell kaj Berila sidis ĉe la tablo en la centro de la ĉambro, manĝante pladon de frititaj kotletoj kaj trinkante teon el bruna fajenca tekruĉo. Trans la dorso de la seĝo de sia patrino Isabela apogis sin. Ŝi tenis kombilon per la fingroj kaj en delikata pensanta maniero ŝi kombis la buklojn for de la frunto de sia patrino. Ekster la flako de lumo el lanterno kaj fajro la ĉambro etendiĝis mallume kaj nude ĝis la kavaj fenestroj.

“Ĉu tiuj estas la infanoj?” Sed ne vere gravis al Linda; ŝi ne eĉ malfermis la okulojn por vidi.

“Demetu la lampon, Kezia,” diris onklino Berila, “aŭ ni atendas, ke la domo ekbrulos, antaŭ ol ni estos el la pakajaj kestoj. Plu da teo Stanleo?”

“Nu, vi eble donu kvin okonojn da taso,” diris S-ro Burnell, klinante trans la tablo. “Prenu pluan kotleton, Berila. Unuaklasa viando, ĉu ne? Ne tro magra, ne tro grasa.” Li turnis sin al sia edzino. “Ĉu vi certas, ke vi ne ŝanĝu vian decidon, Linda karulino?”

“Eĉ pensi pri ĝi estas tro.” Ŝi levis unu brovon laŭ sia maniero. La avino portis panon kaj lakton por la infanoj kaj ili sidis ĉetable, ruĝe vangaj kaj dormemaj malantaŭ la onda vapore.

“Mi havis viandon por mia vespermanĝo,” diris Isabela, ankoraŭ delikate kombante. “Mi havis tutan kotleton por vespermanĝo, la oston kaj ĉion, kaj vorcestran saŭcon. Ĉu ne, patro?”

“Ho, ne fanfaronu, Isabela,” diris onklino Berila.

Isabela mienis konsternita. “Mi ne fanfaronis; ĉu ja, Panjo? Mi neniam pensis, ke mi fanfaronu. Mi kredis, ke ili ŝatus scii. Mi nur intencis informi ilin.”

“Nu, do. Tio sufiĉas,” diris S-ro Burnell. Li forpuŝis sian teleron, elprenis dentopikilon de sia poŝo kaj komencis piki inter siaj fortikaj blankaj dentoj.

“Vi povus certigi, ke Fred havu mordaĵon de io en la kuirejo, antaŭ ol li foriros, ĉu, patrino?”

“Jes, Stanleo.” La maljunulino turnis sin por iri.

“Ho, atendu duonan momenton. Mi supozas, ke neniu scias, kien oni metis miajn pantoflojn? Mi supozas, ke mi ne povos eltiri ilin ĝis monato aŭ du – ĉu?”

“Jes,” venis de Linda. “En la supro de la drelika valizo markita ‘urĝaj necesajoj’.”

“Nu, vi eble prenos ilin por mi, ĉu, patrino?”

“Jes, Stanleo.”

S-ro Burnell ekstaris, streĉis sin, kaj irante al la fajro, li turnis la dorson al ĝi kaj levis la frakajn baskojn.

“Ho, diable, jen aĉa malordo. Ĉu ne, Berila?”

Berila, grade trinkante teon, kun kubutoj sur la tablo, ridetis trans la taso al li. Ŝi surhavis nekutiman, ruĝetan antaŭtukon. La manikoj de ŝia bluzo, volvite ĝis la ŝultroj, montris ŝiajn ravajn efelidajn brakojn kaj ŝi lasis la hararon pendi laŭ sia dorso en longa plektaĵo.

“Kiom longe necesos por ordiĝi – du semajnoj – ĉu?” li ŝercis.

“Hele-ĉiele, ne,” Berila diris sprite. “La plej malbona parto jam pasis. La servistino kaj mi laboregis tute tage kaj, de kiam patrino alvenis, ankaŭ ŝi laboris, kiel ĉevalo. Ni ne sidiĝis dum momento. Ja plena tago.”

Stanleo perceptis riproĉon.

“Nu, mi supozas, ke vi ne anticipas, ke mi hastu for de la oficejo kaj najlu tapiŝojn – ĉu ja?”

“Certe ne,” ridis Berila. Ŝi demetis sian tason kaj kuris el la manĝoĉambro.

“Kion ŝi aĉe atendas, ke ni faru?” demandis Stanleo, “ke ŝi sidu kaj ventumu sin per palma frondo dum mi dungu roton de profesiuloj por fari la taskon? Ho diable, se ŝi ne povas foje helpi sen kribri pri ĝi, kompanse por. ...”

Kaj li mornis dum la kotletoj ekbatalis kontraŭ la teo en sia delikata stomako.

Sed Linda levis manon, kaj tiris lin malsupren al la flanko de sia longa seĝo.

“Jen mizera tempo por vi, ulo,” ŝi diris. Ŝiaj vangoj estis tre blankaj, sed ŝi ridetis kaj volvis siajn fingrojn en la grandan ruĝan manon, kiun ŝi tenis. Burnell kvietiĝis. Subite li ekfajfis, “Pura kiel lilio, feliĉa kaj libera” – bona signo.

“Vi pensas, ke vi ŝatos ĝin?” li demandis.

“Mi ne volas informi vin, sed mi pensas, ke mi devas, patrino,” diris Isabela, “ke Kezia trinkas el la taso de onklino Berila.”

4

La avino kondukis ilin por enlitiĝi. Ŝi iris unua kun kandelo; la ŝtuparo sonoris pro iliaj grim pantaj piedoj. Isabela kaj Ĉarlota kuŝis en ĉambro sole por tiu paro, Kezia buliĝis en la mola lito de sia avino.

“Ĉu ne estos littukoj, mia avino?”

“Ne; ĉi-vespere, ne.”

“Estas tikle,” diris Kezia, “sed estas kiel indianoj.” Ŝi tiris sian avinon malsupren al si kaj kisis ŝin sub la mentono. “Venu baldaŭ por enlitiĝi kaj estu mia indiana militisto.”

“Kia petolulo vi estas,” diris la maljunulino, dum ŝi nestis por Kezia, kiel ŝi ŝatis.

“Ĉu vi ne lasos kandelon por mi?”

“Ne. Ŝŝ. Dormu.”

“Nu, ĉu mi rajtas teni la pordon malferme?”

Ŝi buligis sin, sed ŝi ne endormiĝis. El ĉie en la domo venis la sono de paŝoj. La domo mem knaris kaj knalis. Laŭtaj, frustrantaj voĉoj venis de la suba etaĝo. Unufoje ŝi aŭdis la sturmon de alta ridado de Berila, kaj unufoje ŝi aŭdis laŭtan trumpetan sonon, kiam S-ro Burnell purigis la nazon. Ekster la fenestro, centoj da nigraj katoj kun flavaj okuloj sidis en la ĉielo rigardante al ŝi – sed ŝi ne timis.

Ĉarlota estis diranta al Isabela, “Ĉi-nokte mi diros miajn preĝojn en la lito.”

“Ne, vi ne povos, Ĉarlota.” Isabela estis severa. “Dio nur pardonas vin por preĝi en la lito, se vi tenas temperaturon.” Do Ĉarlota cedis:

“Afabla Jesuo mi dankas pro sano;
Mi petas vin beni al eta infano.”

Kaj tiam ili kuŝiĝis dorse-al-dorse, kun siaj etaj pugoj apenaŭ tuŝantaj, kaj ekdormis.

* * *

Starante en flako da lunlumo, Berila Fairfield malvestis sin. Ŝi laciĝis, sed ŝi ŝajnis, ke ŝi estis pli laca ol ja esti – lasante siajn vestojn malantaŭen fali, puŝante, per apatia gesto, sian varmetan pezan hararon.

“Ho, kiom laca mi estas – tre laca.”

Ŝi momente fermis la okulojn, sed ŝiaj lipoj ridetis. Ŝia spiro kreskis kaj falis en la brusto kiel du ventumantaj flugiloj. La fenestro estis tute malfermita; estis varme, kaj ie, tie ekstere en la ĝardeno juna viro, sunbrune kaj svelte, kun mokantaj okuloj, piedpinte paŝis inter la arbustoj, kaj kolektis la florojn en grandan bukedon, kaj glitis sub ŝia fenestro kaj tenis ĝin al ŝi. Ŝi vidis sin klinante antaŭen.

Li ŝovis sian kapon inter la brilaj vaksaj floroj, ruze kaj ridante. “Ne, ne,” diris Berila. Ŝi turniĝis de la fenestro, kaj faligis la noktan robon sur sian kapon.

“Kiom terure malmodera Stanleo foje estas,” ŝi pensis, butonante la robon. Kaj tiam, dum ŝi kuŝiĝis, venis la malnova penso, la kruela penso – ha, bone estus, se ŝi havus propran monon.

Juna viro, ege riĉa, ĵus alvenis el Anglio. Li renkontas ŝin tute hazarde. ... La nova guberniestro ne estas edziĝinta. ... Estas balo ĉe la gubernia domo. ... Kiu estas tiu rava estaĵo en pale verda sateno? Berila Fairfield. ...

* * *

“La afero, kiu plaĉas al mi,” diris Stanleo, apogante sin kontraŭ la flanko de la lito kaj bone gratante sian ŝultron kaj dorson antaŭ ol enlitiĝi, “estas, ke mi akiris la lokon ege malmultekoste, Linda. Mi hodiaŭ parolis pri ĝi al Valtero Bell kaj li diris, ke li ne povis kompreni, kial oni akceptis mian ciferon. Vi komprenu, en ĉi tiu loko, tero certe fariĝos pli kaj pli valora, ... post ĉirkaŭ dek jaroj ... kompreneble ni devos vivi mallukse kaj tondi kostojn tiom ŝpareme kiom eble. Ne dormante – ĉu vi?”

“Ne, kara, mi aŭdis ĉiun vorton,” diris Linda.

Li saltis en la liton, kliniĝis super ŝin, kaj blovestingis la kandelon.

“Bonan nokton, S-ro Komercisto” diris ŝi, kaj ŝi prenis lian kapon per la oreloj kaj donis al li rapidan kison. Ŝia malforta distanca voĉo, ŝajnis veni el profunda puto.

Bonan nokton, karulino.” Li glitigis sian brakon sub ŝian kolon kaj tiris ŝin al si.

“Jes, tenu min,” diris la malforta voĉo el la profunda puto.

* * *

Patriko, la faktoto, sternaĝis en sia malgranda ĉambro malantaŭ la kuirejo. Lia tualetujo, jako, kaj pantalono pendis de la porda kroĉilo kiel pendumita homo. El la rando de la litkovrilo liaj tordaj piedfingroj elstaris, kaj sur la planko apud li, estis malplena kana birda kaĝo. Li aspektis kiel komika bildo.

“Gak, gak,” venis de la servistino. Ŝi suferis pro limfa glando.

La lasta kiu enlitiĝis estis la avino.

“Ho. Ankoraŭ ne dormante?”

“Ne, mi atendas vin,” diris Kezia. La maljunulino suspiris kaj kuŝis apud ŝi. Kezia puŝis sian kapon sub la brakon de la avino kaj sonigis pepon. Sed la maljunulino nur malforte premis ŝin, kaj ree suspiris, elprenis sian dentan protezon, kaj metis ĝin en glason da akvo apud si sur la planko.

En la ĝardeno kelkaj etaj mopokaj strigoj, sidante sur branĉoj de hoheria arbo, kriis: “Mopok ... mopok.” Kaj distance en la boŝo sonis akra rapida klakado: “Hi-hi-hi ... Hi-hi-hi.”

5

Sunleviĝo venis akre kaj malvarme, kun ruĝaj nuboj sur pale verda ĉielo kaj kun gutoj de akvo sur ĉiu folio kaj tigo. Venteto blovis trans la ĝardenon, faligante roson kaj petalojn, tremante sur la saturitaj kampoj, kaj perdiĝis en la solena arbustaro. En la ĉielo kelkaj etaj steloj momente floris kaj tiam malaperis – solviĝis kiel sapaj bobeloj. Kaj klare aŭdebla en la frua silento estis la sono de la

rojo en la kampo, kuranta sur brunaj ŝtonoj, kuranta en kaj el la sablaj kavaĵoj, kaŝiĝanta sub amasoj da rubusaj arbustoj, verŝiĝanta en marĉon de flavaj ranunkoloj kaj akvaj kresoj.

Kaj tiam je la unua brilo de suno la birdoj ekkantis. Grandaj impertinentaj birdoj, sturno kaj majno, raŭkiĝis sur la gazonoj. La etaj birdoj, la ora-kardelo kaj brune ĉapa mohuo kaj ventumile vosta ripiduro, flugetis de branĉo al branĉo. Rava alciono sidis sur la kampa barilo kaj netigis sian riĉan belecon, kaj blanke gorĝa melifago kantis siajn tri notojn kaj ridis kaj ree kantis ilin.

“Kiom laŭtaj la birdoj estas,” diris Linda en sia sonĝo. Ŝi nun promenis kun sia patro tra la verda kampo aspergita per lekantoj. Subite li kliniĝis kaj apartigis la greson kaj montris al ŝi etan bulon de lanugo ĉe ŝiaj piedoj. “Ho, Paĉjo, la karulo.” Ŝi faris tason el siaj manoj kaj kaptis la etan birdon kaj karesis ĝian kapon per sia fingro. Ĝi estis malsovaĝa. Sed stranga afero okazis. Dum ŝi karesis, ĝi ekŝvelis, ĝi taŭzis kaj glutis, ĝi pli kaj pli grandiĝis, kaj ĝiaj rondaj okuloj ŝajnis rideti kaj kompreni, al ŝi. Nun ŝiaj brakoj estis apenaŭ sufiĉe larĝaj por teni ĝin kaj ŝi faligis ĝin en sian antaŭtukon. Ĝi fariĝis bebo kun granda nuda kapo kaj gapa birda buŝo, fermante kaj malfermante. Ŝia patro laŭte kaj klakade ekridis kaj ŝi vekiĝis, kaj vidis, ke S-ro Burnell staris apud la fenestro kaj klakis la latkurtenon ĝis la tuta supro.

“Hola,” li diris. “Mi ne vekis vin, ĉu? Nenio malbone pri la vetero ĉi-matene.”

Li grandege kontentiĝis. Tia vetero fiksas konfirmon pri lia bona aĉeto. Li iel sentis, ke li ankaŭ aĉetis la belan tagon – ke oni aldonis ĝin malmultekoste kun la domo kaj tereno. Li rapidis al sia bano, kaj Linda turniĝis kaj levis sin sur unu kubuton por vidi la ĉambron per taglumo. La tuta meblaro jam trovis lokon – la tuta malnova ekipaĵo, kiel ŝi esprimis ĝin. Eĉ la fotografaĵoj estis sur la kamenbreto kaj la boteloj de medikamento sur la breto super la lava meblo. Ŝiaj vestoj kuŝis sur seĝo – ŝiaj eksterdomaj aĵoj, purpura mantelo kaj ronda ĉapelo kun pluma tufo. Rigardante ilin, ŝi deziris, ke ankaŭ ŝi nun forirus de ĉi tiu domo. Kaj ŝi vidis sin veturantan for de ili en malgranda kaleŝo, veturantan for de ĉiuj kaj ne eĉ ŝvingi la manon.

Revenis Stanleo, zonite per bana tuko, arde kaj frapante la femurojn. Li ĵetis la malsekan banan tukon al sur ŝiaj ĉapelo kaj mantelo, kaj firme starante en la ĝusta centro de kvadrato da sunlumo li komencis sian gimnastikan ekzercon. Kun profunda spirado, klinado, kaj kaŭrado kiel rano, li elŝutis la kruojn. Li tiel ĝojis pri sia firma, obeema korpo, ke li frapis sin sur la brusto kaj sonigis laŭtan “Ha”. Sed ĉi tiu miriga vigleco ŝajnis mondscale apartigi lin de Linda. Ŝi kuŝis sur la blanka malorda lito kaj rigardis lin kvazaŭ el nuboj.

“Ho, damne! Ho! diable!” diris Stanleo, kiu jam puŝis la kapon en freŝan blankan ĉemizon kaj nur trovis, ke iu idioto jam fiksas la kolan butonon kaj li kaptiĝis. Li paŝis al Linda ŝvingante la brakojn.

“Vi aspektas kiel granda grasa meleagro,” diris ŝi.

“Grase. Kia ideo,” diris Stanleo. “Mi ne havas unu centimetron de graso sur mi. Palpu tion.”

“Ĝi estas ŝtono; – ĝi estas fero,” mokis ŝi.

“Vi surpriziĝus,” diris Stanleo, kvazaŭ tio estus intense interesa, “pri la nombro da uloj ĉe la klubo, kiu havas dikan ventron. Junaj uloj, vi sciu, – viroj de mia aĝo.” Li komencis dislimi sian densan rufan hararon; la bluaj okuloj fiksitaj kaj rondaj en la spegulo, liaj genuoj klinitaj, ĉar la tualeta tablo ĉiam estis – damnu ĝin – iom

tro malalta por li. “Eta Valtero Bell, ekzemple,” kaj li rektiĝis, figuris sur si, grandegan kurbon per la hara broso. “Mi devas diri, ke mi tenas terure. ...”

“Mia kara, ne ĉagreniĝu. Vi neniam estos grasa. Vi estas ege tro vigla.”

“Jes, jes, mi supozas, ke tio veras, diris li, karesita je la centa fojo; kaj prenante poŝan tranĉilon de sia poŝo, li komencis pritondi siajn ungojn.

“Matenmanĝo, Stanleo.” Berila estis ĉe la pordo. “Ho Linda, Panjo diras, ke vi ankoraŭ ne ellitiĝu.” Ŝi enŝovis sian kapon ĉe la pordo. Ŝi portis grandan pecon de siringa floro puŝite tra sia hararo.

“Ĉio, kion ni lasis sur la verando tra la nokto, simple malsekas ĉi-matene. Tie estas kompatinda kara patrino, tuke tordante la tablojn kaj seĝojn. Tamen, okazis nenia difekto –,” ĉi tio kun eta ekrigardo al Stanleo.

“Ĉu vi diris al Patriko, ke li ĝustatempe ĉirkaŭen venigu la kaleŝon? Estas almenaŭ dek kaj duona kilometroj al la oficejo.”

“Mi povas imagi, kia estos ĉi tiu frua komenco al la oficejo,” pensis Linda. “Ja estos tre alta premo.”

“Patriko! Patriko!” Ŝi aŭdis, ke la servistino vokis. Sed ŝajnis, ke estis malfacile trovi Patrikon; la stulta voĉo iris blekante tra la ĝardeno.

Linda ne retranskviliĝis ĝis la fina brua fermo de la ĉefpordo diris al ŝi, ke Stanleo ja vere foriris.

Poste ŝi aŭdis siajn infanojn ludantajn en la ĝardeno. La flegma, kompakta, malgranda voĉo de Ĉarlota kriis: “Ke—zia. Isa—bela.” Ŝi ĉiam perdiĝis aŭ perdis personojn, tamen retrovis ilin, kun granda surprizo, ĉirkaŭ la sekvanta arbo aŭ sekvanta angulo. “Ho, tie vi estas, malgraŭ ĉio.” Post matenmanĝo, oni jam forigis ilin de la domo, kaj oni diris, ke ili ne revenu, ĝis kiam oni vokus ilin. Isabela puŝis beban ĉareton de preciozaj pupoj, kaj ŝi permesis al Ĉarlota, kiel granda regalo, apude promeni por porti la pupan sunombrelon sur la vizaĝo de la vaksa pupo.

“Kien vi iras, Kezia?” demandis Isabela, kiu sopiris trovi, ian malpezan kaj ne prestiĝan deĵoron, kiun Kezia povus fari, kaj tiel esti kaptite sub ŝia rego.

“Ho, nur for,” diris Kezia. ...

Tiam ŝi ne plu aŭdis ilin. Kia brilo estis en la ĉambro. Ŝi malamis, ke oni tiru latkurtenojn ĝis la supro en iu ajn tempo, sed en la mateno tio ne estas tolerebla. Ŝi turnis sin al la muro kaj vante, per unu fingro, ŝi paŭsis sur papavo sur la tapeta papero kun folio kaj tigo kaj grasa ŝvelanta burĝono. En la silento, kaj sub ŝia paŭsanta fingro, la papavo ŝajnis ekvivi. Ŝi povis senti la gluecajn silkecajn petalojn, la tigon, vilan kiel ŝelo de groso, la malglatan folion, kaj la firman glacean burĝonon. Aferoj foje tiel ekvivis. Ne nur grandaj konsiderindaj aĵoj kiel mebloj sed kurtenoj kaj la desegnoj de ŝtofoj, kaj la franĝoj de litkovriloj kaj kusenoj. Kiom ofte ŝi vidis la kvastan franĝon de sia litkovrilo ŝanĝiĝi al amuza procesio da dancantoj kun pastroj servantaj. ... Ĉar estis iuj kvastoj, kiuj tute ne dancis sed digne, promenis, antaŭen klinantaj kvazaŭ preĝantaj aŭ ĉantantaj. Kiom ofte la medikamentaj boteloj ŝanĝiĝis al etaj viroj kun brunaj cilindraj ĉapeloj; kaj la kruĉo de lava meblo sidis en la baseno kvazaŭ grasa birdo en ronda nesto.

“Pasintan nokton, mi sonĝis pri birdoj,” pensis Linda. Kio ĝi estis? Ŝi jam forgesis. Sed la plej stranga parto de ĉi tiu ekvivo de aĵoj estas, kion ili faris. Ili aŭskultis, ili ŝajnis ŝveli kun iu mistera grava enhavo, kaj, kiam ili estis plenaj, ŝi

sentis, ke ili ridetis. Sed ne estis por nur ŝi, ilia ruza sekreta rideto; ili estis anoj de sekreta societo kaj ili ridetis inter si. Foje, kiam ŝi ekdormis en taga tempo, ŝi vekigis kaj ne povis movi fingron, ne povis eĉ turni okulojn al dekstro aŭ maldekstro, ĉar ILI estis tie; foje kiam ŝi iris el ĉambro kaj lasis ĝin neokupita, ŝi sciis, kiam ŝi klakfermis la pordon, ke ILI ekokupis ĝin. Kaj estis fojoj vespere, kiam ŝi estis en la supra etaĝo, kaj ĉiuj aliaj estis en la suba, ke ŝi ne povis eskapi de ILI. Tiam ŝi ne povis rapidi, ŝi ne povis zumi laŭ melodio; se ŝi provis diri tre ege trankvile - "Tedaĵo tiu aĉa fingringo" - ILI ne facile trompiĝis. ILI sciis, kiom ŝi timis; ILI vidis, ke ŝi forturnis la kapon, kiam ŝi preterpasis la spegulon. Linda ĉiam sentis, ke ILI volis ion de ŝi, kaj ŝi sciis, ke se ŝi akceptis kaj estis kvieta, pli ol kvieta, silenta, senmova, io ja estus okazonta.

"Estas tre kviete nun," ŝi pensis. Ŝi larĝe malfermis la okulojn, kaj ŝi aŭdis la silenton, kiu ŝpinis sian molan senfinan araneaĵon. Kiom malpeze ŝi spiris; ŝi apenaŭ devis iom ajn spiri.

Jes, ĉio jam ekvivis eĉ ĝis la plej ete, plej malgranda, plej eta peceto, kaj ŝi ne sentis sian liton, ŝi flosis, tenata en la aero. Tamen ŝajnis, ke ŝi aŭskultis, per siaj larĝe malfermitaj, atentaj okuloj, atendante, por ke iu venu, kiu vere ne venas, rigardante por io, kio nur ne okazas.

6

En la kuirejo ĉe la longa tablo, el dila ligno, sub la du fenestroj, maljuna S-ino Fairfield lavis la matenmanĝan vazaron. La kuireja fenestro elrigardis sur grandan herbaron, kiu kondukis malsupren al legoma ĝardeno kaj la rabarba bedo. Sur unu flanko la herbaro limiĝis per la vazlavejo kaj vestlaveja domo, kaj super ĉi tiu kalkolakta apoga ŝedo kreskis nodhava vito. Ŝi hieraŭ rimarkis, ke kelkaj etaj spiralaj ĉiroj jam venis tute tra iuj fendoj en la vazlaveja plafono kaj ĉiuj fenestroj de la apoga ŝedo havis dikan franĝon de krispa verdo.

"Mi tre ŝatas havi viton," deklaris S-ino Fairfield, "sed mi pensas, ke la uvoj ne maturiĝos ĉi tie. Tio bezonas aŭstralian sunon." Kaj ŝi memoris kiel Berila, kiam ŝi estis bebo, plukis blankajn uvojn de la vito sur la malantaŭa verando de ilia tasmania domo kaj ŝi estis pikita sur la kruro far granda ruĝa formiko. Ŝi imagis vidon de Berila en malgranda plejda robo kun ruĝaj rubandaj ligoj sur la ŝultroj, kriantan tiom timeme, ke duono de la strato alvenis. Kaj kiel la kruro de la infano ŝvelis! "C-c-c-c!" S-ino Fairfield retenis la spiron dum ŝi memoris. "Kompatinda infano, kiom teruriĝa ĝi estis." Kaj ŝi kunpremis la lipojn dum ŝi iris al la fornelo por plua varma akvo. La akvo ŝaŭmis en la granda sapa pelvo kun ruĝetaj kaj bluetaj bobeloj sur la supro de la ŝaŭmo. La brakoj de maljuna S-ino Fairfield nudiĝis ĝis la kubuto kaj brile roze koloris. Ŝi portis grizan fulardan robon kun desegnoj de grandaj purpuraj violoj, blankan linan antaŭtukon, kaj altan ĉapon en formo de gelatena muldilo el blanka muslino. Ĉe ŝia gorĝo estis arĝenta arka luno, sur kio sidis kvin malgrandaj strigoj, kaj ĉirkaŭ sia kolo ŝi portis horloĝetan ĉenon el nigraj globetoj.

Estis malfacile kredi, ke ŝi ne estis en tiu kuirejo dum jaroj; ŝi estis tiom parto de ĝi. Ŝi formetis la vazojn per certa preciza lerteco, kaj moviĝis facile kaj sufiĉe, de la fornelo al la vaza ŝranko. Ŝi rigardis en la manĝoŝrankon kaj la provizejon, kvazaŭ ne ekzistis nekonata angulo. Kiam ŝi finis tion, ĉio en la kuirejo fariĝis parto de serio da kutimoj. Ŝi staris en la mezo de la ĉambro,

viŝante la manojn per kvadrato desegna ŝtofo; rideto brilis sur la lipoj; ŝi pensis, ke ĝi aspektis tre agrabla, tre kontentiga.

“Panjo! Panjo! Ĉu vi estas tie?” vokis Berila.

“Jes, kara. Ĉu vi bezonas min?”

“Ne. Mi venas,” kaj Berila enkuris, vange tre ruĝa, kaj tiris kun si du grandajn pentraĵojn.

“Panjo, kion ajn mi faru al tiuj teruraj malbelaj ĉinaj pentraĵoj, kiujn Chung Wa donis al Stanleo, kiam li bankrotis? Estas absurde diri, ke ili valoras, ĉar ili antaŭe pendis dum monatoj en la fruktobutiko de Chung Wa. Mi ne povas kompreni, kial Stanleo volas reteni ilin. Mi certas, ke li opinias, ke ili estas hidaj, same kiom ni; sed estas pro la kadroj,” ŝi spite diris. “Mi supozas, ke li pensas, ke la kadroj eble, iun tagon, alportos ian monon.

“Kial vi ne pendigu ilin en la pasejo?” proponis S-ino Fairfield, “oni ne multe vidus ilin tie.”

“Mi ne povas. Ne estas spaco. Mi jam tie pendigas ĉiujn fotografaĵojn liajn, pri lia oficejo antaŭ kaj post konstruo, kaj la fotojn kun aŭtografoj de liaj komercaj amikoj, kaj tiun teruran pligrandigon de Isabela kuŝanta sur la mato en sia subĉemizo.” Ŝia kolera ekrigardo skanis la kuirejon. “Mi scias, kion mi faros. Mi pendigos ilin ĉi tie. Mi diros al Stanleo, ke ili iĝis iom humidaj dum moviĝo do, mi devos dume meti ilin ĉi tie.”

Ŝi trenis seĝon antaŭen, saltis sur ĝin, prenis martelon kaj grandan najlon el la poŝo de sia antaŭtuko kaj laŭte frapis.

Jen! Tio sufiĉas! “Donu al mi la pentraĵon, patrino.”

“Unu momento, filino.” Ŝia patrino viŝis trans la ĉizita ebena kadro.

“Ho, patrino, vere ne necesas senpolvigi ilin. Oni bezonus jarojn, se oni purigus ĉiujn tiujn etajn truojn de polvo.” Kaj ŝi kuntiris siajn brovojn super la kapo de sia patrino, kaj senpacience mordis sian lipon. La zorgema maniero de patrino por fari ion ja simple frenezigas. Estas pro maljuneco, ŝi aroge supozis.

Fine la du pentraĵoj pendis flanke-al-flanke. Ŝi saltis de la seĝo, forĵetante la martelon.

“Ili ne aspektas tiom malbone tie, ĉu ne?” ŝi diris. “Kaj ĉiukaze, neniu devas spekti ilin krom Patriko kaj la servistino – ĉu mi havas araneaĵon sur mia vizaĝo, patrino? Mi puŝis la nazon en tiun ŝrankon sub la ŝtuparo kaj nun io daŭre tiklas mian nazon.”

Sed antaŭ ol S-ino Fairfield trafis la tempon por rigardi, Berila jam forturniĝis. Iu frapis sur la fenestro; Linda estis tie, kapsignante kaj ridetante. Ili aŭdis, ke la tenilo de la vazlaveja pordo leviĝis kaj ŝi envenis. Ŝi ne portis ĉapelon, Ŝia hararo supren staris sur sia kapo per bukliloj kaj ŝi volviĝis en malnova kaŝmira ŝalo.

“Mi tiom malsatas,” diris Linda: “kie mi povas akiri ion por manĝi, patrino? Ĉi tiu estas la unua fojo, ke mi estas en la kuirejo. Ĝi diras ‘patrino’ tute ĉie; ĉio estas en paroj.”

“Mi faros por vi manĝeton,” diris S-ino Fairfield, sternante puran buŝtukon sur la angulon de la tablo, “kaj Berila povas preni tason de teo kun vi.”

“Berila, ĉu vi deziras duonon de mia zingibra kuko?” Linda svingis la tranĉilon al ŝi. “Berila, ĉu vi ŝatas la domon nun, ke ni estas ĉi tie?”

“Ho jes, mi ege ŝatas la domon, kaj la ĝardeno estas bela, sed por mi ĝi impresas, ke ĝi estas tre for de ĉio. Mi ne povas imagi, ke personoj venus el la urbo por viziti nin per tiu timinda skuanta buso, kaj mi certas, ke estas neniu ajn proksime por veni kaj viziti. Komprenoble ne gravas al vi ĉar. ...”

“Sed jen la kaleŝo,” diris Linda. “Patriko povas veturigi vin al la urbo, kiam ajn vi volas.”

Tio estis konsolo, certe, sed estis io, kion Berila nur malklare atentis, por kio ŝi eĉ ne faris vortojn por si mem.

“Ho nu, almenaŭ ni ne mortos pro tio,” ŝi seke diris, demetante la malplenan tason kaj ekstarante kaj streĉante sin. “Mi iros por pendigi kurtenojn.” Kaj ŝi forkuris kantante.

“Kiom mil birdoj vidas mi;
El arboj laŭte kantas ili. ...”

“... birdojn vidas mi; El arboj laŭte kantas ili. ...” Sed kiam ŝi atingis la manĝoĉambron, ŝi ĉesis kanti, ŝia vizaĝo ŝanĝiĝis; ĝi fariĝis malgaja kaj malafabla.

“Oni povus egale putri ĉi tie kiel ie alia,” ŝi sovaĝe murmuris, ŝovante la rigidajn latunajn pinglojn en la ruĝajn serĝajn kurtenojn.

La du personoj, kiuj restis en la kuirejo, silentis dum kelka tempo. Linda apogis sian vangon sur la fingroj kaj rigardis sian patrinon. Ŝi pensis, ke ŝia patrino aspektis mirinde bela kun ŝia dorso kontraŭ la foliara fenestro. Estis io komfortiga en la vidaĵo de ŝi, kaj sen tio, Linda perceptis, ke ŝi neniam povus kunteniĝi. Ŝi bezonis la dolĉan flaron de ŝia korpo, kaj la molan palpon de ŝiaj vangoj kaj ŝiaj brakoj kaj ŝultroj eĉ pli molaj. Ŝi amis la manieron, en kiu ŝiaj haroj bukliĝis, arĝente ĉe la frunto, pli hele ĉe ŝia kolo, kaj ankoraŭ brile brunaj en la granda spiralo sub la muslina ĉapo. Rafinitaj estis la manoj de la patrino, kaj la du ringoj, kiujn ŝi portis, ŝajnis degeli en ŝia kremkolora haŭto. Kaj ŝi ĉiam estis tiom freŝa, tiom franda. La maljunulino povis toleri nenion krom lino apud la korpo, kaj ŝi banis en malvarma akvo, vintre kaj somere.

“Ĉu ne estas io, kion mi faru?” demandis Linda.

“Ne, karulino, Mi deziras, ke vi iru en la ĝardenon kaj prizorgu viajn infanojn; sed mi scias, ke tion vi ne faros.”

“Komprenoble mi ja faros, sed vi scias, ke Isabela estas multe pli plenkreska ol iu el ni.”

“Jes, sed Kezia ne estus,” diris S-ino Fairfield.

“Ho, Kezia estas ĵetita far virbovo antaŭ horoj,” diris Linda, ree volvante sin en sian ŝalon.

Sed ne, Kezia jam vidis virbovon tra noda truo en la palisa barilo, kiu apartigis la tenisejan gazonon de la kampo. Sed ŝi ne multe ŝatis la virbovon, do ŝi forpromenis reen tra la frukta ĝardeno, supren laŭ la gresa deklivo, laŭ la pado apud la hoheria arbo kaj tiel en la sternitan taŭzitan ĝardenon. Ŝi ne kredis, ke ŝi iam ne perdiĝus en ĉi tiu ĝardeno. Dufoje ŝi trovis sian vojon, reen al la grandaj, feraj pordegoj, tra kiuj ili veturis la antaŭan nokton, kaj tiam turniĝis por promeni laŭ la alirejo, kiu kondukis al la domo, sed ekzistis tiom da etaj padoj ĉe ambaŭ flankoj. Ĉe unu flanko, ĉiuj kondukis al boŝo de altaj, malhelaj arboj kaj strangaj arbustoj kun plataj veluraj folioj kaj lanugaj kremkoloraj

floroj, kiuj zumis pro muŝoj, kiam oni skuis ilin – ĉi tio estis la timiga flanko, kaj tute sen ĝardeno. La etaj padoj ĉi tie estis malsekaj kaj argilaj kun radikoj de arboj trans ilin kiel spuroj de grandaj piedoj de kokoj.

Sed ĉe la alia flanko de la alirejo estis alta buksa bordero kaj la padoj havis buksajn randojn kaj ĉiuj el ili kondukis al profunda kaj pli profunda komplikaĵo de floroj. La kamelioj floris, blanke kaj karmine, kaj punce kaj blanke striate kun brilantaj folioj. Oni ne povis vidi iun folion sur la siringaj arbustoj pro la blankaj grapoloj. La rozoj floris – rozoj por butontruoj de viroj, malgrandaj blankaj, sed tro plenaj da insektoj por preni sub ies nazo, puncaj monato-daŭraj rozoj kun ringo de falintaj petaloj ĉirkaŭ la arbustoj, centri-foliaj rozoj sur dikaj tigoj, kaj damaskaj rozoj ĉiam kun burĝonoj, ruĝetaj glataj beluloj malfermantaj por buklo post buklo, ruĝaj tiom malhelaj, ke ili ŝajnis nigriĝi, kiam ili falis, kaj iu rava kremkolora speco kun svelta ruĝa tigo kaj brilaj skarlataj folioj.

Jen tufoj de konvaloj, kaj ĉiuj specoj de geranioj, kaj arbitaj verbenoj kaj bluaj lavendaj arbustoj kaj bedo de pelargonioj kun veluraj okuloj kaj folioj kiel flugiloj de tineo. Estis bedo de nenio krom rezedo kaj alia de nenio krom violegoj – bordero de duoblaj kaj unuopaj lekantoj kaj ĉiuj specoj de etaj tufaj plantoj, kiujn ŝi neniam antaŭe vidis.

La kniphofioj estis pli altaj ol ŝi; la heliantoj kreskis en eta ĝangalo. Ŝi sidiĝis sur unu el la buksaj borderoj. Per komence forta premo ŝi faris agrablan seĝon. Sed kiom polva ĝi interne estis! Kezia kliniĝis por vidi kaj ternis kaj frotis la nazon.

Kaj tiam ŝi trovis sin ĉe la supro de la gresa ruliĝada deklivo, kiu kondukis malsupren al la frukta ĝardeno. ... Ŝi momente rigardis malsupren al la deklivo; tiam ŝi ekkuŝis sur la dorso, grincis, kaj ruliĝadis al la dense flore ĝardena gazono. Dum ŝi kuŝis, atendente por la mondo ĉesi rondiri, ŝi decidis iri al la domo por peti la servistinon por malplena alumeto-skatolo. Ŝi volis fari surprizon por la avino. ... Ŝi unue enmetos folion kun granda violo kuŝanta sur ĝi, tiam ŝi metos tre etan blankan dianton, eble ĉe ĉiu flanko de la violo, kaj tiam aspergos la supron per lavendo, sed ne por kovri iliajn kapojn.

Ŝi ofte faris tiujn surprizojn por la avino, kaj ili ĉiam tre sukcesis.

“Ĉu vi deziras alumeton, mia Avinjo?”

“Ho, jes, infano, mi kredas, ke alumeto estas ĝuste tio, kion mi serĉas.”

La avino malrapide malfermis la skatolon kaj interne trovis la bildon.

“Ho, bone grazie, infano! Kiel vi mirigis min!”

“Mi povas ĉi-loke fari unu por ŝi ĉiun tagon,” ŝi pensis, grimpante tra la greso per ŝiaj glitaj ŝuoj.

Sed dum ŝia reiro al la domo ŝi venis al tiu voja insulo, kiu situis en la mezo de la alirejo, kiu dividis la alirejon al du vojoj, kiuj kuniĝis antaŭ la domo. La voja insulo konsistis el alta gresa taluso. Nenio kreskis sur la supro krom unu grandega planto kun dikaj, grize verdaj, dornaj folioj, kaj el la centro fontis alta fortika tigo. Iuj el la folioj de la planto tiom aĝis, ke ili ne plu volviĝis al supro; ili reen turniĝis, ili estis fenditaj kaj rompita; iuj el ili kuŝis plataj kaj velkaj sur la grundo.

Kion ajn ĝi povas esti? Ŝi neniam antaŭe vidis ion tian. Ŝi staris kaj fiksrigardis. Kaj tiam ŝi vidis sian patrinon venantan laŭ la pado.

“Kio ĝi estas, patrino?” Kezia demandis.

Linda rigardis supren al la dika, svelanta planto kun ĝiaj kruelaj folioj kaj karna tigo. Alte super ili, kvazaŭ flosante en la aero, kaj tamen tenante tiom fikse al la tero, ĝi eble havis ungegojn anstataŭ havi radikojn. La kursivaj folioj ŝajnis kaŝi ion; la blinda tigo tranĉis en la aeron, kvazaŭ nenia vento povus skui ĝin.

“Tio estas aloo, Kezia,” diris ŝia patrino.

“Ĉu ĝi iam ajn havas florojn?”

“Jes, Kezia,” kaj Linda ridetis sur ŝin, kaj duone malfermis siajn okulojn. “Jen unufoje en ĉiuj cent jaroj.”

7

Veturante hejmen de la oficejo Stanleo Burnell haltigis la kaleŝon ĉe la butikoj Bodega, eliris kaj aĉetis grandan botelon de ostroj. Ĉe la apuda fruktejo de la Ĉino, li aĉetis ananason en bona kondiĉo, kaj rimarkante korbon de freŝaj nigraj ĉerizoj, li petis, ke Johano enmetu ankaŭ duonan kilogramon de ili. La ostrojn kaj la ananason li pakis en la skatolon sub la antaŭa sidejo, sed la ĉerizojn li retenis en sia mano.

Patriko, la faktoto, saltis de la koĉera benko kaj ree nestis por li per la bruna kovrilo.

“Levu la piedojn, S-ro Burnell, dum mi volvos ĝin sub ilin,” diris li.

“Ĝuste, ĝuste! Unuarange, diris Stanleo. “Nun vi povas senhalte iri hejmen.”

Patriko donis frapon al la griza ĉevalino kaj la kaleŝo saltis antaŭen.

“Mi kredas, ke ĉi tiu homo estas unuaranga ulo,” pensis Stanleo. Li ŝatis la aspekton de li sidante tie supre en lia orda bruna jako kaj bruna bulĉapelo. Li ŝatis la manieron, en kiu Patriko nestis por li, kaj li ŝatis liajn okulojn. Li estis neniel lakea – kaj se estis iu afero, kion li malamamis pli ol alia, ĝi estis lakeemo. Kaj ŝajnis, ke la okupo plaĉis al li – jam feliĉa kaj kontenta.

La griza ĉevalino tre bone iris; Burnell malpacienkis por esti el la urbo. Li volis esti hejme. Ha, estis grandioze loĝi en la kamparo – por foriri tute el tiu plumpa urbo tuj, kiam la oficejo jam fermiĝas, kaj ĉi tiu veturo en la freŝa varma aero, dume sciante, ke lia domo estas ĉe la vetura fino, kun ĝiaj ĝardenoj kaj kampoj, ĝiaj tri bonegaj bovinoj kaj sufiĉaj kokinoj kaj anasoj por provizi kortobirdojn, ankaŭ estis grandioze.

Kiam ili fine foriris de la urbo kaj ili ruliĝis for laŭ la senhoma vojo, lia koro forte batis pro ĝojo. Li serĉis en la sako kaj komenciĝis per la ĉerizoj, manĝis po tri aŭ kvar ĉiufoje, ĵetante la kernojn trans la flankon de la kaleŝo. Ili estis bongustaj vere dikaj kaj malvarmaj, sen makulo aŭ kontuzo sur ili.

Rigardu tiun paron, nun – nigra je unu flanko kaj blanka la alia – perfekte! Perfekte malgranda paro da siamaj ĝemeloj. Kaj li metis ilin en sian butontruon. ... Ho vere, mi ŝatus doni manplenon al tiu ulo – sed ne, prefere ne. Prefere atendu, ĝis kiam tiu estos iom pli longatempe kun li.

Li komencis plani, kion li faros en liaj sabataj posttagmezoj kaj en liaj dimanĉoj. Li ne iros sabate al la klubo por lunĉo. Ne, li foriru de la oficejo tiom frue kiom eble kaj kiam li alvenos hejme petu al ili donu al li tranĉaĵojn da malvarma viando kaj duonan laktukon. Kaj tiam li venigos kelkajn ulojn el la urbo por ludi tenison dum la posttagmezo. Ne tro multaj – maksimume tri. Krome,

Berila estas bona ludanto. ... Li etendis sian dekstran brakon kaj malrapide fleksis ĝin, palpante la muskolon. ... Bano, bone masaĝi sin, cigaro sur la verando post manĝo. ...

Dimanĉe matene ili iros al la preĝejo – infanoj kaj ĉiuj. Tio memorigis lin, ke li devos lui kirkan benkon, en sunlumo, se eble kaj tre antaŭe por esti preter la trablovo el la pordo. En imago li aŭdis sin tonigi ege bone:

“Vi, venkinte la pikilon de la morto,
malfermis la Regnon de la Ĉielo al ĉiuj kredantoj.”

Kaj li vidis la netan afiŝon kun latuna rando ĉe la angulo de la kirka benko – S-ro Stanleo Burnell kaj familio. ... Por la restaĵo de la tago li maldiligentus kun Linda. ... Nun ili promenis laŭ la ĝardeno; ŝi tenis lian brakon, kaj li daŭre eksplikis al ŝi, kion li intencis fari ĉe la oficejo, la sekvontan semajnon. Li aŭdis, ke ŝi diris: “Mia kara, mi pensas, ke tio estas tre saĝa.” ... Priparoli aferojn kun Linda estis miriga helpo, eĉ se oni emis vagi for de la temo.

Ho ve! Ili ne veturis vere rapide. Patriko jam refaris la bremson. Diable! Kia bruta objekto ĝi estas. Li povis senti ĝin en la mezo de sia stomako.

la paniko ekkaptis Burnell, kiam ajn li proksimiĝis al sia hejmo. Antaŭ ol li estis tute interne de la alireja pordego, li krius al iu ajn videbla: “Ĉu ĉio estas en ordo?” Kaj tiam li ne kredis, ke ja estis, ĝis li aŭdis, ke Linda diris: “Hola! Ĉu vi ree estas hejme?” Tio estis la malbono de vivo en la kamparo – bezoni diablon de tempo por reveni. ... Sed nun ili ne estis malproksime. Ili estis sur la supro de la fina monteto; estis milda deklivo por la restaĵo de la vojo, kaj nun malpli ol kilometro.

Patriko tiris la vipon trans la dorso de la ĉevalino kaj li kaĵolis al ŝi: “Hot! Hot nun!”

Mankas kelkaj minutoj ĝis sunsubiro. Ĉio staris senmove banite en brila, metala lumo kaj el la kampoj ĉe ĉiu flanko fluis la lakta aromo de matura greso. La feraj pordegoj estis malfermaj. Ili hastis tra ili laŭ la alirejo kaj ĉirkaŭ la insulo, haltante kontraŭ la preciza mezo de la verando.

“Ĉu ŝi plaĉis al vi, S-ro?” diris Patriko, malsupren paŝante de la koĉera benko kaj larĝe ridetante al sia mastro.

“Ja tre bone, Patriko,” diris Stanleo.

Linda venis el la vitra pordo; ŝia voĉo sonoris en la ombra silento. “Hola! Ĉu vi ree estas hejme?”

Je la sono de ŝi lia koro batis tiom forte, ke li apenaŭ povis ne rapidi supren laŭ la ŝtupoj kaj kapti ŝin en siaj brakoj.

“Jes, mi ree hejmas. Ĉu ĉio estas en ordo?”

Patriko komencis ĉirkaŭen konduki la kaleŝon al la flanka pordego, kiu aliris en la korton.

“Nu, duonan momenton,” diris Burnell. “Donu al mi tiujn du pakojn.” Kaj li diris al Linda, “Mi reportis por vi botelon de ostroj kaj ananason;” kvazaŭ li venigis la tutan rikolton de la mondo.

Ili iris en la vestiblon, Linda portis la ostrojn per unu mano kaj la ananason per la alia. Burnell fermis la vitran pordon, forĵetis sian ĉapelon, metis siajn brakojn ĉirkaŭ ŝin kaj prenis ŝin al li, kisante la supron de ŝia kapo, ŝiajn orelojn, ŝiajn lipojn, ŝiajn okulojn.

“Ho ve! Ho ve!” diris ŝi. “Atendu momenton. Lasu min formeti ĉi tiujn stultajn aĵojn,” kaj ŝi metis la ostrojn kaj la ananason sur malgrandan ĉizan seĝon. “Kion vi havas, en via butontruo – ĉerizojn?” Ŝi elprenis ilin kaj pendigis ilin trans lia orelo.

“Ne faru tion, karulino. Ili estas por vi.”

Do ŝi reprenis ilin de lia orelo. “Ne gravas al vi, se mi rezervas ilin. Ili difektus mian apetiton por vespermanĝo. Venu por vidi viajn infanojn. Ili vespermanĝas.”

La lampo jam lumis sur la infana ĉambra tablo. S-ino Fairfield tranĉis panon kaj ŝmiris buteron. La tri etaj knabinoj sidis ĉe la tablo, portante grandajn brustotukojn, brodite kun iliaj nomoj. Ili viŝis la buŝojn, kiam ilia patro envenis, pretaj, por ke li kisu ilin. La fenestroj estis malfermaj; poto de sovaĝaj floroj staris sur la kamenbreto, kaj la lampo faris grandan molan cirklon de lumo sur la plafono.

“Ŝajne, vi estas komforta, patrino,” diris Burnell, palpebrumante pro la lumo. Isabela kaj Ĉarlota sidis, iu ĉe ĉiu flanko de la tablo, Kezia sidis kontraŭ la kaploko de la tablo – la kaploko ne okupiĝis.

“Tie estas, kie mia filo devus sidi,” pensis Stanleo. Li streĉis la brakon ĉirkaŭ la ŝultro de Linda. Ho Dio, li estas perfekta stultulo, ke li sentis sin tiom feliĉa!

“Ni ja estas, Stanleo. Ni estas tre komfortaj,” diris S-ino Fairfield, tranĉante la panon de Kezia en fingrojn.

“Plaĉas al vi pli bone ol la urbo – ĉu, infanoj?” demandis Burnell.

“Ho, jes,” diris la tri etaj knabinoj, kaj Isabela aldonis postan penson: “Mi dankas vin, ja tre multe, patro kara.”

“Venu al supra etaĝo,” diris Linda. “Mi portos viajn pantoflojn.”

Sed la ŝtuparo estis tro mallarĝa por iri supren brake-en-brake. Estis tre mallume en la ĉambro. Li aŭdis ŝian ringon frapante sur la marmora kamenbreto, dum ŝi palpis por la alumetoj.

“Mi havas kelkajn, karulino. Mi lumigos la kandelojn.”

Sed anstataŭe li venis malantaŭ ŝi kaj li ree metis siajn brakojn ĉirkaŭ ŝin kaj premis ŝian kapon al sia ŝultro.

“Mi estas tiom konfuze feliĉa,” li diris.

“Ĉu ja?” Ŝi turniĝis kaj metis siajn manojn sur lian bruston kaj rigardis supren al li.

“Mi ne scias, kio trafis min,” li protestis.

Estis nun tre mallume ekstere kaj masa roso falis. Kiam Linda fermis la fenestron la malvarma roso tuŝis la pintojn de ŝiaj fingroj. Fore hundo bojis. “Mi kredas, ke estos luno,” ŝi diris.

Je ĉi vortoj, kaj kun la malvarma malseka roso sur siaj fingroj, ŝi sentis kvazaŭ la luno jam leviĝis – ke ŝi strange malkovriĝis en inundo de malvarma lumo. Ŝi tremis; ŝi foriris de la fenestro kaj eksidis sur la kusena skatolo apud Stanleo.

* * *

En la manĝoĉambro, per la flagretoj de la ligna fajro, Berila sidis sur pieda kuseno ludante gitaron. Ŝi jam banis sin kaj ŝanĝis ĉiujn siajn vestaĵojn. Nun ŝi portis blankan muslinan robon kun nigraj makuloj, kaj en sia hararo ŝi jam

alpinglis nigran silkan rozon.

“Naturo foriris por kuŝi, kara,
Jen ni kaj neniŭ alia.
Nu donu vian manon por tuŝi, kara,
Ĝentile kaj apud la mia.”

Ŝi ludis kaj kantis duone al si, ĉar ŝi rigardis sin ludantan kaj kantantan. La fajra lumo briletis sur ŝiaj ŝuoj, sur la rufa ventro de la gitaro, kaj sur ŝiaj blankaj fingroj. ...

“Se mi estus ekster la fenestro, kaj enrigardus kaj vidus min, mi vere mirus,” pensis ŝi. Eĉ pli delikate ŝi ludis la akompanaĵon – ne kantante nun, sed aŭskultante.

“... La unuan fojon, ke mi iam ajn vidis vin, malgranda knabino – ho, vi havis neniun ideon, ke vi ne estis sola – vi sidis kun viaj etaj piedoj sur pieda kuseno, ludante gitaron. Dio, mi ne povas forgesi. ...” Berila supren ĵetis sian kapon kaj rekomencis kanti:

“Eĉ la luno estas laca. ...”

Sed okazis laŭta bato ĉe la pordo. La ruĝeta vizaĝo de la servistino tie aperis.

“Bonvole, F-ino Berila, Mi devos veni por ordigi la tablon.”

“Certe, Alica,” diris Berila, en voĉo de glacio. Ŝi metis la gitaron en ĉambran angulon. Alica impetis en la ĉambron kun peza nigra fera pleto.

“Nu, mi trafis aĉan taskon pro tiu forno,” ŝi diris. “Mi ne sukcesas brunigi ion ajn.”

“Vere!” diris Berila.

Sed ne, ŝi ne povis toleri tiun stultulan knabinon. Ŝi kuris en la malluman salonon kaj komencis promeni tien kaj reen. ... Ho, ŝi estis maltrankvila, ho maltrankvila. Estis spegulo super la kamenbreto. Ŝi apogis la brakojn kaj rigardis sian palan ombron en ĝi. Kiel bela ŝi aspektis, sed estis neniŭ, kiu vidas, neniŭ.

“Kial vi devas tiel suferi?” diris la vizaĝo en la spegulo. “Vi ne estis destinata por suferi. ... Ridetu!”

Berila ridetis, kaj vere ŝia rideto ja estis tiel adorinda, ke ŝi ree ridetis – sed ĉi-foje, ĉar ŝi ne povis ne rideti.

8

"Bonan matenon, S-ino Jones.”

“Ho, bonan matenon, S-ino Smith. Mi tre ĝojas vidi vin. Ĉu vi venigis viajn infanojn?”

“Jes, mi venigis ambaŭ miajn ĝemelojn. Mi naskis pluan bebon, post kiam mi laste vidis vin, sed ŝi naskiĝis tiom subite, ke mi ankoraŭ ne havas tempon por fari vestojn por ŝi. Do mi lasis ŝin hejme. ... Kiel fartas via edzo?”

“Ho, li bone fartas, dankon. Almenaŭ li terure trafis malvarmumon sed Reĝino Viktoria – ŝi estas mia baptopatrino, vi scias, – sendis al li skatolon de ananasoj kaj tio sanigis lin, tuje. Ĉu tiu estas via nova servistino?”

“Jes, ŝi nomiĝas Gvenda. Mi jam havas ŝin dum nur du tagoj. Ho, Gvenda, ĉi tiu estas mia amikino, S-ino Smith.”

“Bonan matenon, S-ino Smith. Tagmanĝo ne estos preta ĝis ĉirkaŭ dek minutoj.”

“Mi pensas, ke vi ne prezentu min al la servistino. Mi pensas, ke mi nur ekparolu al ŝi.”

“Nu, ŝi estas pli kiel helpistino ol servistino kaj oni ja prezentas helpistinon, mi scias, ĉar S-ino Samuelo Josephs havis iun.”

“Ho, nu, ne gravas,” diris la servistino, senzorge, miksante ĉokoladan kremajon per duono de ligna vesta pinĉilo. Oni bone bakas la manĝon sur betona ŝtupo. Ŝi komencis sterni la tukon sur ruĝetan ĝardenan benkon. Antaŭ ĉiu persono ŝi metis du telerojn el geraniaj folioj, forkon el pina pingla folio, kaj tranĉilon el vergeto. Estis tri lekanto-kapoj sur laŭra folio por poĉitaj ovoĵoj, kelkaj tranĉaĵoj de fuchsia petala bifstekoj, kelkaj ravaj risoloj faritaj el grundo kaj akvo kaj leontodaj semoj, kaj la ĉokolada kremajon, kiun ŝi jam decidis, ke ŝi servos en la konko de iriza halioto, en kiu ŝi kuiris ĝin.

“Ne necesas ĝeni pri miaj infanoj,” ĉarme diris S-ino Smith. “Se vi prenis tiun botelon, kaj vi plenigus ĝin ĉe la krano – mi volas diri, ĉe la laktejo.”

“Ho, bone,” diris Gvenda, kaj ŝi flustris al S-ino Jones: “Ĉu mi iru kaj petu al Alica por iom da vera lakto?”

Sed iu vokis de la antaŭo de la domo, kaj la lunĉa festo disiĝis, lasante la ĉarman tablon, lasante la risolojn kaj poĉitajn ovoĵojn por la formikoj, kaj maljuna heliko, kiu puŝis siajn tremantajn antenojn trans la randon de la ĝardeno benko kaj komencis mordi la geranian teleron.

“Rondiru al la antaŭo, infanoj. Filipino kaj Ĉifono jam venas.”

La knaboj Trout estis la kuzoj, kiujn Kezia menciis al la butikisto. Ili loĝis for je kilometro en domo, kiu nomiĝas Simia Arba Kabano. Filipino estis alta por sia aĝo, kun longa nigra hararo kaj blanka vizaĝo, sed Ĉifono estis tre malgranda kaj tiom magra, ke, kiam li estis senvesta, liaj skapoloj elstaris kiel du etaj flugiloj. Ili posedis hibridan hundon kun bluetaj okuloj kaj longa vosto, supreniĝa ĉe la fino, kiu ĉien sekvis ilin; li nomiĝis Bilardo. Ili pasigis duonon de sia tempo por kombi kaj brosi Bilardon kaj dozi lin per diversaj teruraj miksaĵoj fabrikitaj fare de Filipino, kaj kaŝita far li en rompita kruĉo kovrita per malnova kaldrona ĉapo. Eĉ fidela Ĉifono ne rajtis scii la tutan sekreton de tiuj miksaĵoj. ... Prenu iom da fenola dentopasto kaj pinĉaĵo de subtila sulfura pulvoro, kaj eble iom da amelo por rigidigi la hararon de Bilardo. ... Sed tio ne estis ĉio; Ĉifono sekrete pensis, ke la restaĵo estis pulvo. ... Kaj oni ne permesis lin helpi pri la miksaĵo pro la danĝero. ... “Nu, se peco de ĉi tio flugus en vian okulon, vi blindiĝus tra vivdaŭro,” Filipino diris, kirlante la miksaĵon per fera kulero. “Kaj ĉiam ekzistas la risko – nur la risko, konsciu – de eksplodo, se oni sufiĉe forte batus ĝin. ... Du kuleraĵoj kvantoj da ĉi tio en kerosena ladskatolo sufiĉas por mortigi milojn da puloj.” Sed Bilardo pasigis sian tutan liberan tempon mordante, kaj snufante, kaj li abomene odoris.

“Estas, ĉar li estas tia impona batalanta hundo,” Filipino diris. “Ĉiuj batalantaj hundoj odoras.”

La knaboj Trout jam ofte pasigis tagon ĉe la urba domo de la familio Burnell, sed nun ĉar ili loĝis ĉe ĉi tiu grandioza domo kaj bonega ĝardeno, ili emis esti tre amikeca. Krome, ambaŭ ŝatis ludi kun knabinoj – Filipino, ĉar li povis ruzi al ili, kaj ĉar Ĉarlota tiel facile timiĝas, kaj Ĉifono pro hontinda kialo. Li adoris pupojn. Ho, li rigardus pupon dum ĝi kuŝis por dormi, parolante en flustro kaj timeme

ridetante, kaj kia regalo estis al li, se oni permesis, ke li tenu iun. ...

“Kurbigu viajn brakojn ĉirkaŭ ŝin. Ne tenu ilin tiel rigidaj. Ne faligu ŝin,” Isabela severe dirus.

Nun ili staris sur la verando kaj retenis Bilardon, kiu volis iri en la domon, sed oni ne permesis tion, ĉar onklino Linda malamis decajn hundojn.

“Ni venis per la aŭtobuso kun Panjo,” ili diris, “kaj ni pasigos la posttagmezon kun vi. Ni kunportis bakaĵon de zingibra kuko por onklino Linda. Nia Minja faris ĝin. Estas nuksoj ĉie.”

“Mi senŝeligis la migdalojn,” diris Filipino. “Mi nur metis mian manon en kuirpoton de bolanta akvo kaj elkaptis ilin kaj donis ian pinĉon kaj la nuksoj flugis el la ŝeloj, iuj tiom alten, kiom la plafono. Ĉu ne, Ĉifono?”

Ĉifono kapjesis. “Kiam oni faras kukojn ĉe ni,” diris Filipino, “ni ĉiam restas en la kuirejo, Ĉifono kaj mi; kaj mi akiras la bovlon kaj li akiras la kuleron kaj la kirlilon. Spongokuko plej bonas. Tiam ĉio estas ŝaŭma aĵo.”

Li kuris malsupren laŭ la ŝtupoj de la verando al la gazono, metis la manojn sur la greson, kliniĝis antaŭen, kaj apenaŭ ne staris per sia kapo.

“Tiu gazono havas tuberojn,” li diris. “Oni devas havi ebenan lokon por stari per la kapo. Mi povas promeni ĉirkaŭ la araŭkaria arbo sur mia kapo ĉe nia hejmo. Ĉu ne, Ĉifono?”

“Preskaŭ,” diris Ĉifono, tre mallaŭte.

“Staru per via kapo sur la verando. Tio estas tute ebena,” diris Kezia.

“Ne, multe-stulte!” diris Filipino. “Oni devas fari ĝin sur iu mola gazono. Ĉar se oni trafas skuon kaj forfalas, io en la kolo klakas, kaj ĝi forrompiĝos. Paĉjo diris al mi.”

“Ho, ni ja ludu ion,” diris Kezia.

“Do, bone,” rapide diris Isabela, “ni ludu hospitalojn. Mi estos la flegistino kaj Filipino povas roli kiel la kuracisto, kaj vi kaj Ĉarlota kaj Ĉifono povas roli kiel malsanaj personoj.”

Ĉarlota ne volis ludi tion, ĉar lastan fojon Filipino premis ion en ŝian gorĝon kaj tio terure dolorigis ŝin.

“Puf,” mokis Filipino. “Ĝi estis nur suko el mandarina ŝelo.”

“Do, ni ludu sinjorinojn,” diris Isabela. “Filipo povas esti la patro kaj vi povas esti ĉiuj niaj karaj etaj infanoj.”

“Mi malamas ludi sinjorinojn,” diris Kezia. “Vi ĉiam igas nin iri al la kirko mane-en-mane kaj veni hejmen kaj enlitiĝi.”

Subite Filipino prenis malpuran poŝtukon el sia poŝo. “Bilardo! Ĉi tien hundo,” li vokis. Sed Bilardo, kiel kutime, provis forŝteliĝi, kun vosto inter la kruroj. Filipino saltis sur lian supron, kaj premis lin inter siaj genuoj.

“Tenu lian kapon firma, Ĉifono,” li diris, kaj ligis la poŝtukon ĉirkaŭ la kapo de Bilardo per stranga nodo elstaranta ĉe la supro.

“Tio estas por kio ajn?” demandis Ĉarlota.

“Estas por trejni la orelojn por kreski pli proksime al lia kapo – kompreni?” diris Filipino. “Ĉiuj batalantaj hundoj havas orelojn, kiuj kuŝas malantaŭen. Sed la oreloj de Bilardo estas iom tro molaj.”

“Mi scias,” diris Kezia. “La orela interno ĉiam eksteriĝas. Mi malamas tion.”

Bilardo ekkuŝis, per unu piedo, li malforte provis forigi la poŝtukon, sed eksciante, ke li ne povas, treniĝis post la infanoj, tremante pro mizero.

9

Patriko vigle venis; en la mano li tenis malgrandan hakileton, kiu palpebrumis en la suno.

“Venu kun mi,” li diris al la infanoj, “kaj mi montros al vi kiel la reĝoj de Irlando forhakis la kapon de anaso.”

Ili formoviĝis – ĉar ili ne kredis lin, kaj krome, la knaboj Trout neniam antaŭe renkontiĝis kun Patriko.

“Ek nun,” li kaĵolis, ridetante kaj prezentante sian manon al Kezia.

“Ĉu estas vera kapo de anaso? Unu el la kampoj?”

“Ja estas,” diris Patriko. Ŝi metis sian manon en lia malmola seka mano, kaj li metis la hakileton en sian zonon kaj prezentis la alian manon al Ĉifono. Li amis junajn infanojn.

“Pli bone mi tenu la kapon de Bilardo, se ie estos ajna sango,” diris Filipo, “ĉar la vido de sango tre sovaĝigas lin.” Li kuris antaŭen trenante al Bilardo per la poŝtuko.

“Ĉu vi pensas, ke ni devus iri?” flustris Isabela. “Ni ne demandis aŭ ion alian. Ĉu ne?”

Ĉe la malsupro de la frukta ĝardeno estis pordo lokita en la palisa barilo. Ĉe la alia flanko, la kruta deklivo kondukis malsupren al ponto, kiu etendiĝis trans la rojo, kaj, kiam oni supreniris laŭ la deklivo ĉe la alia flanko, oni estis proksima al la kampoj. Eta malnova stablo en la unua kampo nun fariĝis korto-birda domo. La kokinoj jam foren vagis trans la kampo malsupren al forĵetaĵa ejo en kavaĵo, sed la anasoj restis proksimaj al parto de la rojo, kiu fluis sub la ponto.

Altaj arbustoj pendis super la rivereto kun ruĝaj folioj kaj flavaj floroj kaj grapoloj de fruktaj rubusoj. Ĉe iuj lokoj la rivereto estis larĝa kaj malprofunda, sed ĉe aliaj ĝi falis al en la profundaj malgrandaj lagetoj, kun ŝaŭmo ĉe la randoj kaj tremantaj vezikoj. Estis en ĉi tiuj lagetoj, ke la grandaj blankaj anasoj hejmgigis sin, naĝante kaj vorante laŭ la herbaj bordoj.

Tien kaj reen ili naĝis, netigante siajn pompajn brustojn, kaj aliaj anasoj kun la samaj pompaj brustoj kaj flavaj bekoj naĝis kun ili renversite.

“Jen la irlanda mara armeo, diris Patriko, “kaj rigardu la maljunan admiralon tie kun la verda kolo kaj la impona eta flagstango sur lia vosto.”

Li prenis manplenon de greno el sia poŝo kaj komencis promeni al la korto-birda domo, pigre, kun lia pajla ĉapelo kun la rompita verto tiritita super siajn okulojn.

“Lid. Lid-lid-lid-lid-,” li vokis.

“Kŭa. Kŭa-kŭa-kŭa-kŭa-,” respondis la anasoj, celante teron, kaj flugilbate kaj supren grimpante la bordon, ili fluis post li, per longa ŝancelanta linio. Li kaĵolis al ili, kaj ŝajnis ĵeti la grenon, skuante ĝin en siaj manoj kaj vokis ilin ĝis ili etendiĝis ĉirkaŭ lin en blanka cirklo.

El malproksime la kokinoj aŭdis la bruon kaj ankaŭ ili venis, kurante trans la kampon, la kapoj antaŭen, la flugiloj etenditaj; ili turnis siajn piedojn enen laŭ la

stulta maniero de kokoj, kaj riproĉante dum ili venis.

Tiam Patriko disĵetis la grenon kaj la avaraj anasoj komencis vori. Rapide li kliniĝis, ekkaptis du, unu sub ĉiu brako, kaj transpaŝis al la infanoj. Iliaj sagantaj kapoj kaj rondaj okuloj timigis la infanojn – ĉiujn krom Filipo.

“Ek nun, stultuloj,” li kriis, “ili ne povas mordi. Ili ne havas dentojn. Ili havas nur tiujn du truetojn en siaj bekoj por spiri.”

“Ĉu vi prenos unu, dum mi finos la alian?” demandis Patriko. Filipo maltenis Bilardon. “Ĉu mi ne! Ĉu mi ne! Donu unu al mi. Ne gravas al mi, kiom multe ĝi piedbati.”

Li preskaŭ ploris pro plezuro, kiam Patriko donis blankan bulon en liajn brakojn.

Malnova arba stumpo estis apud la pordo de la kortobirda domo. Patriko ekprenis la anason per la kruroj, kuŝigis ĝin plate trans la stumpo, kaj preskaŭ je la sama momento, la malgranda hakileto malsupren venis, kaj la kapo de la anaso flugis de la stumpo. Supren la sango ŝprucis sur la blankajn plumojn kaj sur lian manon.

Kiam la infanoj ekvidis la sangon, ili ne plu timis. Ili kunpremiĝis ĉirkaŭ lin kaj komencis krii. Eĉ Isabela ĉien saltis kriante: “La sango! La sango!” Filipo ĉiel forgesis pri lia anaso. Li simple ĵetis ĝin for de li kaj kriis, “Mi vidis ĝin. Mi vidis ĝin,” kaj saltis ĉirkaŭ la ligna ŝtupo. Ĉifono, kun vangoj tiel blankaj kiel papero, kuris al la eta kapo, elmetis fingron, kvazaŭ li volis tuŝi ĝin, retiriĝis kaj tiam ree elmetis fingron. Li ĉie tremetis.

Eĉ Ĉarlota, timanta eta Ĉarlota, ekridis kaj fingre montris la anason kaj ŝriakis: “Rigardu, Kezia, rigardu.”

“Spektu ĝin!” kriis Patriko. Li demetis la korpon kaj ĝi komencis ŝanceliĝe paŝi – kun nur longa ŝpruco de sango, kie la kapo antaŭe estis; ĝi ekpaŝis for sen sono al la kruta bordo, kiu kondukis al la rivereto. ... Tio estis la triumfa miro.

“Ĉu vi vidis tion? Ĉu vi vidis tion?” kriegis Filipo. Li kuris inter la malgrandaj knabinoj ektirante al iliaj antaŭtukoj.

“Ĝi similas al eta lokomotivo. Ĝi similas al eta fervoja lokomotivo,” knaris Isabela.

Sed Kezia subite impetis al Patriko kaj ĵetis siajn brakojn ĉirkaŭ liajn gambojn, kaj ŝi batis sian kapon tiom forte, kiom ŝi povis kontraŭ liaj genuoj.

“Remetu kapon! Remetu kapon!” ŝi kriis.

Kiam li kliniĝis por movi ŝin, ŝi malvolis malteni nek forpreni sian kapon. Ŝi daŭre tenis al li tiom forte, kiom ŝi povis kaj plorsingultis: “Kapo sur ĝi! Kapo sur ĝi!” ĝis tio sonis, kiel laŭte stranga singultado.

“Ĝi haltas. Ĝi stumble falas. Ĝi estas mortinta,” diris Filipo.

Patriko supren tiris al Kezia en siajn brakojn. Ŝia kufo jam falis malantaŭen, sed ŝi malvolis permesi, ke li rigardu ŝian vizaĝon. Ne, ŝi premis sian vizaĝon al osto en lia ŝultro kaj kune agrafis al siaj manoj por preni siajn brakojn ĉirkaŭ lia kolo.

La infanoj ĉesis krii tiel subite, kiel ili komencis. Ili staris ĉirkaŭ la mortinta anaso. Ĉifono ne plu timis pro la kapo. Li genuis kaj nun fingre karesis ĝin.

“Mi pensas, ke ĝi ankoraŭ ne estas tute mortinta,” li diris. “Ĉu vi pensas, ke

ĝi restus viva, se mi donus al ĝi ion por trinki?”

Sed Filipo tre koleriĝis: “Ba! Stulta bebo.” Li fajfis al Bilardo kaj foriris.

Kiam Isabela iris al Ĉarlota, Ĉarlota ekmovis sin for.

“Pro kio vi ĉiam tuŝas min, Isabela?”

“Kuraĝe,” diris Patriko al Kezia. “Jen la bonega eta knabino.”

Ŝi supren metis siajn manojn kaj tuŝis liajn orelojn. Ŝi palpis ion. Malrapide ŝi levis sian tremetantan vizaĝon kaj rigardis. Patriko portis en la oreloj, etajn rondajn orajn ringojn. Ŝi neniam sciis, ke viroj portis orelingojn. Ŝi tre surpriz- iĝis.

“Ĉu oni povas forpreni kaj remeti ilin?” ŝi raŭke demandis.

10

Supre en la domo, en la varma orda kuirejo, Alica, la servistino, pretigis la posttagmezan manĝon. Ŝi estis formale vestita. Ŝi portis nigran ŝtofan robon, kiu odoris sub la brakoj, blankan antaŭtukon, kiel grandan folion de papero, kaj puntan banton fiksitan al sia hararo per du harpingloj. Ŝi jam ankaŭ ŝanĝis siajn komfortajn molajn pantoflojn al paro de nigraj, ledaj domaj ŝuoj, kiuj pinĉis la kalon sur ŝia malgranda piedfingro, iel terure. ...

Estis varme en la kuirejo. Kalifora muŝo zumis, nebulo de vaporo iris el la kaldrono, kaj la kovrilo faris klakadan dancon dum la akvo bobelas. La horloĝo tiktakis en la varma aero, malrapide kaj senŝanĝe, kiel la klikado de la trikilo de maljunulino, kaj foje – pro nenia ajn kialo, ĉar ekzistis neniu venteto – la lat- kurteno svingiĝis, foren kaj reen, kaj frapadis la fenestron.

Alica pretigis akvo-kresajn sandviĉojn. Ŝi havis bulon de butero sur la tablo, kesto-panon, kaj la kresojn ŝancelitajn sur blankan tukon.

Sed apogita kontraŭ la butera ujo estis malpura grasa malgranda libro, duone stebita, kun kurbaj randoj, kaj dum ŝi kaĉigis la buteron, ŝi legis:

“Songi pri nigraj skaraboj tirantaj ĉerkveturilon estas malbone. Signifas morton de iu, kiun vi konsideras najbara aŭ kara, ĉu patro, edzo, frato, filo, aŭ fianĉo. Se skaraboj rampas malantaŭen, dum vi observas ilin, tio signifas morton pro fajro aŭ el granda alto, kiel ŝtuparo aŭ skafaldo, ktp.

“Araneoj. Songi, ke araneoj rampas sur vi estas bone. Signifas, ke granda sumo da mono venos en proksima estonteco. Se songanto estus graveda, oni anticipus facilan akuŝon. Sed zorgu en la sesa monato por eviti manĝadon de eblaj moluskoj. ...”

“Kiom mil birdoj vidas mi.”

Ho, vivo. Tio estas Fraŭlino Berila. Alica faligis la tranĉilon kaj la *Sonĝo-Libro* kuŝiĝis sub la buteran ujon. Sed ŝi ne havis tempon por tute kaŝi ĝin, ĉar Berila kuris en la kuirejon kaj ĝis la tablo, kaj la unua afero, kiu frapis ŝian okulon, estis tiuj grasaj randoj. Alica vidis la signifoplene malgrandan rideton de Fraŭlino Berila kaj la manieron, per kiu ŝi levis la brovojn, kaj kuntiris la okulojn, kvazaŭ ŝi ne tute certas, kion tio povus esti. Ŝi decidis respondi, se Fraŭlino Berila demandus al ŝi: “Nenio, kio apartenas al vi, Fraŭlino.” Sed ŝi sciis, ke Fraŭlino Berila ne demandus al ŝi.

Alica estis milda estulo en realo, sed ŝi havis la plej mirindajn replikojn

pretajn por demandoj, kiujn ŝi sciis, ke oni metus al ŝi. La verkado de ili, kaj la ripeta pripenso de ili en la menso, konsolis ŝin tiom kvazaŭ ŝi ja eksplikis ilin. Efektive, tio tenadis ŝin viva en situacioj, kie oni tiom ĉagrenis ŝin, ke ŝi timis enlitiĝi kun skatolo de alumetoj sur la seĝo pro timo, ke ŝi formordus la kapojn de ili dum ŝi dormas, kiel oni povas diri.

“Ho, Alica,” diris Fraŭlino Berila. “Estos unu aldona por manĝo, do varmigu pladon de skonoj de hieraŭ, bonvole. Kaj surmetu tiun viktorian sandviĉon aldone kun la kafo-kuko. Kaj ne forgesu, ke vi metu malgrandajn puntajn matojn sub la telerojn – ĉu jes? Vi ja hieraŭ, vi scias, kaj la manĝo aspektis tiel malbela kaj vulgara. Kaj, Alica, ne denove metu tiun timindan malnovan ruĝetan kaj verdan mufon sur la posttagmeza tekruĉo. Tiu estas nur por la matenoj. Vere, mi pensas, ke oni rezervu ĝin por la kuirejo – ĝi estas tiel kaduka, kaj tute fetora. Surmetu la japanan mufon. Vi tute komprenas, ĉu ne?”

Fraŭlino Berila jam finiĝis.

“El arboj laŭte kantas ili ...”

Ŝi kantis dum ŝi foriris el la kuirejo, kontenta pri sia severa traktado de Alica.

Alica furiozis. Ŝi ne estis iu, kiu kontraŭis ordonadon, sed estis io en la maniero, en kiu Fraŭlino Berila parolis al ŝi, kiun ŝi ne povis toleri. Ho, tion ŝi ne povis. Ĝi igis ŝin krispiĝi en la stomako, kiel oni povas diri, kaj ŝi plene tremis. Sed kion Alica vere malamis pri Fraŭlino Berila, estas, ke ŝi faris al ŝi senton de deprimado. Ŝi parolis al Alica en speciala voĉo kvazaŭ mankis klapo en ties kapo; kaj ŝi neniam koleriĝis al ŝi – neniam. Eĉ kiam Alica lasis ion fali aŭ forgesis ion gravan, ŝajnis, ke Fraŭlino Berila atendis, ke tio okazos.

“Se plaĉas al vi, S-ino Burnell,” diris imaga Alica, dum ŝi ŝmiris buteron sur la skonoj, “mi preferus ne preni ordonojn de Fraŭlino Berila. Mi eble estas nura vulgara servistino, kiu ne scias kiel ludi gitaron, sed. ...”

Ĉi tiu lasta tiom plaĉis al ŝi, ke ŝi tute regajnis sian trankvilon.

“La sola afero por fari,” ŝi aŭdis kiam ŝi malfermis la pordon de la manĝo-ĉambro, “estas tute elimini la manikojn kaj anstataŭe havu nur larĝan bendon de nigra veluro trans la ŝultroj. ...”

11

La blanka anaso ne aspektis, kvazaŭ ĝi iam posedis kapon, kiam Alica, tiun vesperon, metis ĝin antaŭ Stanleo Burnell. Ĝi kuŝis en bele priverŝite rostita demisio, sur blua plado – siaj kruroj kunligitaj per peco de ŝnuro kaj kun girlando de malgrandaj pilkoj de farĉo ĉirkaŭ ĝi.

Estis malfacile diri, kiu el la du, Alica aŭ la anaso, aspektis pli bone priverŝite rostita; ambaŭ el ili havis tiom riĉan koloron kaj havis la saman mienon de masko kaj streĉo. Sed Alica estis flame ruĝa, kaj la anaso estis mahagone kolora.

Burnell observigis sian okulon trans la randon de la tranĉilo. Li tre fieris pri sia distranĉado, pri sia unuaklasa faro de tio. Li malamis vidi virinon dum distranĉi; ili ĉiam tro malrapidas, kaj ŝajne ne gravas al ili, kiel poste aspektas la viando. Nu ja gravas al li; li fieris pri tranĉado, delikate raboti erojn de malvarma bovaĵo, por malgrandaj pecoj de ŝafaĵo je precize la ĝusta dikeco, kaj dividadon de kokino aŭ anaso per fajna mezuro.

“Ĉu ĉi tio estas la unua el niaj hejmaj produktoj?” li demandis, bone sciante, ke ĝi ja estis.

“Jes, la viandisto ne venis. Ni eltrovis, ke li vizitas nur dufoje en semajno.”

Sed ne necesis pardonpeti. Ĝi estis elstara birdaĵo. Ĝi apenaŭ estis viando sed speco de pli bonega gelateno. “Mia patro dirus,” diris Burnell, “ĉi tiu certe estu unu el tiuj birdoj, kies patrino ludis al ĝi en infaneco per la germana fluto. Kaj la dolĉaj tonoj de la ĉarma instrumento agis kun tia efiko sur la infana menso. ... Havu iom pli, Berila? Vi kaj mi estas la solaj en ĉi domo kun vera sento por manĝaĵo. Mi ja volonte pretas aserti, en juĝeja kortumo, se necese, ke mi amas bonan manĝaĵon.”

Oni servis manĝon en la salono, kaj Berila, kiu pro iu kialo jam estis tre ĉarma al Stanleo, de kiam li hejmen alvenis, proponis kartludon de kribaĝo. Ili sidis ĉe malgranda tablo apud unu el la malfermitaj fenestroj. S-ino Fairfield malaperis, kaj Linda kuŝis en lulseĝo, kun la brakoj super sia kapo, balancante tien kaj reen.

“Vi ne volas havi la lumon – ĉu ja, Linda?” diris Berila. Ŝi movis la lampon, por ke ŝi sidu sub ĝia mola lumo.

Kiom foraj ili aspektis, tiuj du, de kie Linda sidis, kaj balanciĝis. La verda tablo, la brilaj ludkartoj, la grandaj manoj de Stanleo, kaj tiuj etaj de Berila, ĉio ŝajnis esti parto de unu mistera movado. Stanleo mem, grande kaj masive, en sia malhela kompleto, malstreĉiĝis kaj Berila ekskuis sian gajan kapon kaj paŭtis. Ĉirkaŭ sia gorĝo ŝi surhavis nekutiman veluran rubandon. Ĝi iel ŝanĝis ŝin, – tio aliigis la formon de ŝia vizaĝo – sed ĝi estis ĉarma, Linda decidis. La ĉambro odoris de lilioj; estis du grandaj kruĉoj de arumaj floroj en la kameno.

“Dek-kvin, du – dek-kvin, kvar – kaj paro estas ses; kaj sekvo de tri estas naŭ,” diris Stanleo, tiom intence, ke li ŝajnis kalkuli ŝafojn.

“Mi havas nenion krom du paroj,” diris Berila, troigante sian malfeliĉon, ĉar ŝi sciis, kiel li amis venki.

La kejlaj, por registri poentojn en la kribaĝa kartludo, similis al du personoj kune irantaj laŭ la vojo, turniĝantaj ĉirkaŭ la akuta angulo, kaj reen irantaj laŭ la vojo. Ili postkuris unu la alian. Ili ne volis, tiom antaŭkuri la alian, kiom resti sufiĉe proksime por paroli – por resti apude, eble sufiĉis.

Sed ne, ĉiam estis unu, kiu malpacienis, kaj antaŭen kuris, kiam la alia proksimiĝis, kaj ne volis aŭskulti. Eble la blanka kejlo timis la ruĝan, aŭ eble li estis kruela, kaj ne volis doni ŝancon al la ruĝa por paroli. ...

Sur la antaŭo de sia robo, Berila portis bukedon de violoj, kaj unufoje kiam la etaj kejlaj apudis, ŝi klinis sin kaj la violoj elfalis, kaj kovris ilin.

“Kia domaĝo,” ŝi diris, relevante la violojn. “Ĝuste kiam ili havis ŝancon por flugi en la brakojn de la alia.”

“Adiaŭ, mia fraŭlino,” ridis Stanleo, kaj foren la ruĝa kejlo kuris.

La salono estis longa kaj mallarĝa, kun vitraj pordoj, kiuj kondukis al la verando. Ĝi havis kremkoloran tapetan paperon, kun desegno de oritaj rozoj, kaj la meblaro, kiu antaŭe apartenis al maljuna S-ino Fairfield, estis malhela kaj ordinara. Malgranda piano staris kontraŭ la muro, enmetita per flava plisita silko, en la ĉizita antaŭo. Super ĝi pendis pentraĵo far Berila de granda grapolo de klematidaj floroj, kiuj ŝajnis surprizitaj. Ĉiu floro grandis, kiom eta subtaso, kun centro kiel miranta okulo kun nigra franĝo. Sed la ĉambro ankoraŭ ne

finiĝis. Stanleo entuziasme antaŭĝuis akiron de sofo kaj du bonegaj foteloj. Ĝi plaĉis al Linda plej bone kiel ĝi estis. ...

Du grandaj tineoj enflugis tra la fenestro kaj ĉirkaŭadis laŭ la cirklo de lampa lumo.

“Forflugu antaŭ ol tro malfruas. Reen elflugu.”

Ĉirkaŭen ili flugis; ŝajnis, ke ili kunportis la silenton, kaj la lunlumon sur siaj silentaj flugiloj. ...

“Mi havas du reĝojn,” diris Stanleo. “Ĉu ia utilo?”

“Ja utile,” diris Berila.

Linda ĉesis balanciĝi kaj ekstaris. Stanleo tien rigardis. “Ĉu io misas, karulino?”

“Ne, nenio. Mi iros por trovi patrinon.”

Ŝi eliris de la ĉambro kaj, starante ĉe la malsupro de la ŝtuparo, vokis, sed la voĉo de la patrino respondis al ŝi de la verando.

La luno, kiun Ĉarlota kaj Kezia jam vidis de la ĉaro de la butikisto estis plenumo, kaj la domo, la ĝardeno, la maljunulino kaj Linda; – ĉiuj banis en evidentiga lumo.

“Mi jam observis la aloon,” diris S-ino Fairfield. “Mi kredas, ke ĝi ĉi-jare floros. Rigardu la supron tie. Ĉu tiuj estas burĝonoj, aŭ ĉu nur efiko de lumo?”

Dum ili staris sur la ŝtupoj, la alta gresa taluso, sur kiu la aloo kuŝis, altiĝis kvazaŭ ondo, kaj la aloo ŝajnis rajdi sur ĝi, kiel ŝipo kun levitaj remiloj. Brila lunlumo pendis sur la levitaj remiloj kiel akvo, kaj sur la verda ondo trembrilis la roso.

“Ĉu ankaŭ vi sentas ĝin,” diris Linda, kaj ŝi parolis al sia patrino per tia speciala voĉo, kiun virinoj nokte uzas inter si, kvazaŭ ili parolas en dorme aŭ el ia vasta kaverno – “Ĉu vi ne sentas, ke ĝi estas venanta al ni?”

Ŝi revis, ke io levis ŝin el la malvarma akvo sur la ŝipon kun levitaj remiloj, kaj burĝonanta masto. Nun la remiloj falis trafante rapide, rapide. Ili remis tre for trans la supro de la ĝardenaj arboj, la kampoj kaj la malhela boŝo preter ĝi. Ha, ŝi aŭdis sin krei: “Pli rapide! Pli rapide!” al tiuj, kiuj remis.

Kiom pli reala ĉi tiu revo estas, ol ke ili iru reen al la domo, kie la dormantaj infanoj kuŝis, kaj kie Stanleo kaj Berila kartludis kribaĝon.

“Mi kredas, ke tiuj estas burĝonoj,” diris ŝi. “Ni iru malsupren en la ĝardenon, patrino. Mi ŝatas tiun aloon. Mi ŝatas ĝin pli ol ion ajn ĉi tie. Kaj mi certas, ke mi memoros ĝin, post kiam mi jam forgesos ĉiujn la aliajn aferojn.”

Ŝi metis sian manon sur la brakon de sia patrino kaj ili promenis malsupren laŭ la ŝtupoj, ĉirkaŭ la insulo kaj ĝis la ĉefa alirejo, kiu kondukis al la antaŭaj feraj pordegoj.

Rigardante ĝin de malsupre, ŝi povis vidi la longajn akrajn dornojn, kiuj ĉirkaŭis la aloajn foliojn, kaj je la ekvido de ili, ŝia koro hardiĝis. ... Ŝi aparte ŝatis la longajn akrajn dornojn. ... Neniu kuraĝus veni proksimen al la ŝipo aŭ sekvi.

“Ne eĉ mia granda hunda ulo,” ŝi pensis, “kiun mi tre ŝatas dum taga tempo.”

Ĉar ŝi vere amis lin, ŝi ege amis kaj admiris kaj respektis lin. Ho, pli bone ol iun alian en la mondo. Ŝi ĝisfunde konis lin. Li estis la animo de vero kaj deco,

kaj malgraŭ sia praktika sperto, li estis tre simpla, kaj oni facile kontentigis lin kaj facile doloris lin. ...

Nur se li ne tiel saltus al ŝi, kaj tiel laŭte bojus, kaj tiel observus ŝin per tiaj avidaj amantaj okuloj. Li estis tro forta por ŝi; ŝi ĉiam malamis objektojn, kiuj sturmas al ŝi, ekde infaneco. Estis tempoj, kiam li estas timiga – vere timiga. Kiam ŝi apenaŭ ne kriĉis plenvoĉe: “Vi mortigas min.” Kaj je tiuj okazoj ŝi sopiris diri la plej krudajn malamajn aferojn. ...

“Vi scias, ke mi estas tre delikata. Vi scias tiel bone kiel mi, ke mia koro suferas, kaj la kuracisto jam diras al vi, ke mi eble mortos en iu momento. Mi estas naskinta tri grandajn bulojn de infanoj jam. ...”

Jes, jes, prave. Linda ektiris sian manon for de la brako de sia patrino. Malgraŭ ĉia ŝia amo kaj respekto kaj admirado, ŝi malamis lin. Kaj kiel tenera li ĉiam estis, post tiaj okazoj, kaj kiel cedema, kiel kompleza. Li farus ion ajn por ŝi; li sopiris servi ŝin. ... Linda aŭdis sin diri per malforta voĉo:

“Stanleo, ĉu vi lumigus kandelon?”

Kaj ŝi aŭdis lian ĝojan voĉon respondi: “Kompreneble mi ja faros tion mia karulino.” Kaj li saltis el la lito, kvazaŭ li saltus al la luno por ŝi.

Neniam estis tiel klare por ŝi kiel en ĉi momento. Estis ĉiu el ŝiaj sentoj por li, klaraj kaj difinitaj, unu tiel vera kiel la alia, ĉi tiu malamo tiom reala kiom la restaĵo. Ŝi povus meti siajn sentojn, per etaj pakaĵoj kaj doni ilin al Stanleo. Ŝi sopiris liveri tiun lastaĵon al li, kiel surprizo. Ŝi povus vidi liajn okulojn, kiam li malfermus tion. ...

Ŝi kune premis siajn krucbrakojn kaj komencis silente ridi. Kiel absurda vivo estas, – estas ridinda, simple ridinda. Kaj kial ĉi tiu ŝia manio por eĉ daŭrigi vivon? Ĉar tio vere estis manio, ŝi pensis, mokante kaj ridante.

“Por kio mi tiel prizorge ŝirmas min? Ĉu mi daŭre naskos infanojn kaj Stanleo daŭre gajnos monon, kaj la infanoj kaj la ĝardenoj kreskos pli kaj pli grande, kun tutaj ŝiparoj de alooj en ili, el kiuj mi elektu.”

Ŝi jam promenadis kun klinita kapo, rigardante nenion. Nun ŝi rigardis supren kaj ĉirkaŭen. Ili staris apud la ruĝaj kaj blankaj kameliaj arboj. Belaj estis la riĉaj malhelaj folioj aspergitaj per lumo kaj rondaj floroj, kiuj sidas inter ili kiel ruĝaj kaj blankaj birdoj. Linda plukis pecon de verbena, kaj ĉifis ĝin, kaj etendis siajn manojn al sia patrino.

“Estas delice,” diris la maljunulino. “Ĉu vi malvarmiĝas, filino? Ĉu vi tremas? Jes, viaj manoj estas malvarmaj. Ni prefere reiru al la domo.”

“Pri kio vi pensadis?” diris Linda. “Diru al mi.”

“Mi ne vere pensis pri io ajn. Mi scivolas, dum ni preterpasis la horton, kia estas la fruktarboj kaj, ĉu ni povos fari multon da marmelado ĉi-aŭtune. Estas grandiozaj bonfartaj ribaj arbustoj en la legoma ĝardeno. Mi hodiaŭ rimarkis ilin. Mi ja ŝatus vidi tiujn bretojn en la manĝo-ŝranko plene provizitaj per nia propra konfitaĵo. ...

12

"MIA KARA NANCIA,
“Ne pensu, ke mi estas fabela porkido, ĉar mi ne antaŭe skribis. Mi ne havis momenton, kara, kaj eĉ nun mi sentas min tiom laciĝinta, ke mi

apenaŭ povas teni plumon.

“Nu, la terura ago estas farita. Ni efektive forlasis la kapturan kirlon de urbo, kaj mi ne povas imagi, kiel ni iam ajn reiros, ĉar mia bofrato aĉetis ĉi tiun domon ‘tion kaj ĉion,’ por uzi liajn proprajn vortojn.

“Iu maniere, kompreneble, ĝi estas miriga malŝarĝo, ĉar li minacis preni lokon en la kamparo, ekde kiam mi loĝis kun ili – kaj mi devas diri, ke la domo kaj ĝardeno estas mirige agrablaj – milionoble pli bone ol tiu terura kabaneto en la urbo.

“Sed entombigita, mia kara. Entombigita ne estas la vorto.

“Ni havas najbarojn, sed ili estas nur farmantoj – grandaj krudulaj knaboj, kiuj ŝajne tute tage melkas, kaj du teruraj inuloj kun leporaj dentoj, kiuj kunportis al ni kelkajn skonojn, kiam ni translokiĝis kaj diris, ke plaĉus al ili, por helpi. Sed mia fratino, kiu loĝas for je kilometro, ne konas iun ajn ĉi tie, do mi certas, ke ni neniam konos iun. Estas sufiĉe certe, ke neniu iam ajn venos el la urbo por viziti nin, ĉar kvankam estas aŭtobuso, ĝi estas malbona malnova klakanta aĵo kun nigraj ledaj flankoj, en kiu iu deca persono mortus prefere, ol ke tiu veturi tra dek kilometroj.

“Tia estas vivo. Estas malgaja fino por kompatinda eta Berila. Mi fariĝos tre terure malmoderna aĉulino post unu du jaroj kaj vizitos vin portante pluvan mantelon kaj maristan ĉapelon ligitan per blanka aŭtomobila silka vualo. Tiom bele.

“Stanleo diras, ke nun, ke ni jam establiĝas – ĉar post la plej terura semajno de mia vivo, ni establiĝas – sabate posttagmeze, li venigos du tri virojn de la klubo por ludi tenison. Efektive oni promesis du kiel granda regalo por hodiaŭ. Sed, mia kara, se vi povus vidi la virojn de la klubo de Stanleo ... iom dikece, tiu tipo, kiu aspektas maldeca sen veŝto ĉiam kun piedfingroj, kiuj iom turniĝas al centro – tiom okulfrape, kiam oni promenas laŭ la korto per blankaj ŝuoj. Kaj ili ĉiuminute supren tiras siajn pantalonojn – ĉu vi ja scias – kaj frapante al imagaj aĵoj per la rakedoj.

“Mi antaŭe ludis kun ili ĉe la klubo lastan someron, kaj mi certas, ke vi konos la tipon, kiam mi diras al vi, ke post kiam mi estis tie trifoje, ili nomis min Fraŭlino Berila. Estas malgaja mondo. Kompreneble patrino simple amas la lokon, sed mi supozas, ke, kiam mi estas je la aĝo de patrino, mi estos kontenta sidi en la suno kaj meti pizojn el guŝo en basenon. Sed mi ne kontentas – ne – ne.

“Kion Linda pensis pri la tuta afero, kiel kutime, mi ne havas la plej etan ideon. Mistere kiel ĉiame. ...

“Mia kara, vi konas tiun blankan satenan robon, mian. Mi tute elprenis la manikojn, enmetis nigrajn velurajn zonojn trans la ŝultroj, kaj du grandajn ruĝajn papavojn el la franca ĉapelo de mia kara fratino. Ĝi estas granda sukceso, sed kiam mi surhavas ĝin, mi ne scias.”

* * *

Berila sidis skribante ĉi tiun leteron ĉe malgranda tablo en sia ĉambro. Iamaniere, kompreneble, ĝi estis tute perfekte vera, sed en alia maniero ĝi estis la plej granda rubaĵo kaj ŝi ne kredis vorton de ĝi. Ne, tio ne veras. Ŝi sentis ĉiujn tiujn aferojn, sed ŝi ne vere tiel sentis ilin.

Estis ŝia alia memo, kiu jam skribis tiun leteron. Ĝi ne nur tedis, male ĝi

naŭzis ŝian veran memon.

“Frivole kaj stulte,” diris ŝia propra memo. Tamen ŝi sciis, ke ŝi ja sendos ĝin kaj ŝi ĉiam skribos tian specon de sensencaĵo al Nancia Pym. Efektive tio estis milda ekzemplo de tia letero, kiun ŝi ĝenerale skribis.

Berila apogis siajn kubutojn sur la tablo kaj ree tralegis ĝin. La voĉo de la letero ŝajne leviĝis al ŝi de la paĝo. Ĝi jam estis malforta, kiel voĉo aŭdata telefone, alte, ŝprucante, kun io amara en la sono. Ho, ŝi abomenis ĝin hodiaŭ.

“Vi ĉiam havas tiom da vivanteco,” diris Nancia Pym. “Estas pro tio, ke viroj entuziasmas pri vi.” Kaj ŝi aldonis, iom funebre, ĉar viroj ne entuziasmis pri Nancia, kiu estis solida tipo de fraŭlino, kun grasaj koksoj kaj alta koloro. – “Mi ne povas kompreni, kiel vi eltenas tion. Sed ĝi estas via naturo, mi supozas.”

Kia rubaĵo! Kia sensencaĵo! Tute ne estis ŝia naturo. Hele-ĉiele, se ŝi iam estis sia propra memo al Nancia Pym, Nancia saltus el la fenestro pro surprizo. ... Mia kara, vi konas tiun blankan satenon mian. ... Berila brue fermis la leterokeston.

Ŝi ekstaris kaj duone senkonscie, duone konscie, ŝi vagis al la spegulo.

Jen staris svelta fraŭlino en blanko – blanka serĝa jupo, blanka silka bluzo, kaj leda zono kuntirita tre strikte ĉe ŝia eta talio.

Ŝia vizaĝo estis koro-forma, larĝa ĉe la brovoj kaj kun pinta mentono – sed ne tro pinta. Ŝiaj okuloj, tiu paro de okuloj estis eble ŝia plej bona trajto; la paro havis tiel strangan nekutiman koloron – verdan bluon kun etaj oraj punktoj sur ili.

Ŝi havis belajn nigrajn brovojn kaj longajn okulharojn – tiom longajn, ke, kiam ili kuŝis sur ŝiaj vangoj, oni vere trafis la lumon en ili; iu ajn diris al ŝi.

Ŝia buŝo estis iom granda; ĉu tro granda? Ne, ne vere. La subo de ŝia mal-supra lipo iomete elstaris; ŝi montris kutimon, kie ŝi ensuĉis ĝin, kion, iu alia diris, estis ege fascina.

Ŝia nazo estis ŝia malplej kontentiga trajto. Tamen ĝi ne estis vere malbela. Sed ĝi ne estis duone tiom bona, kiom tiu de Linda; kiu vere havis perfektan etan nazon. Ŝia nazo iom etendiĝis – ne malbone. Kaj plej eble ŝi troigis la etendiĝon de ĝi, nur ĉar ĝi estis ŝia nazo, kaj ŝi estis tiom kritikema pri si. Ŝi kunpremis ĝin per polekso kaj montro-fingro, kaj faris etan grimacon. ...

Rava, rava hararo. Kaj tioma amaso da ĝi. Ĝi havis la koloron de freŝe falintaj folioj, brunaj kaj ruĝaj kun rebrilo de oro. Kiam ŝi traktis ĝin al longa plektaĵo, ŝi sentis ĝin sur sia dorsa spino kiel longa serpento. Ŝi ŝatis senti la pezon, ke ĝi malantaŭen tiris ŝian kapon, kaj ŝi ŝatis senti ĝin libera, kovranta siajn nudajn brakojn. “Jes mia kara, jen nenia dubo pri tio, vi vere estas rava etulino.”

Je la vortoj, ŝia brusto leviĝis; ŝi prenis longan enspiron de ĝojigo, duone fermante siajn okulojn.

Sed eĉ dum ŝi rigardis, la rideto velkis de ŝiaj lipoj kaj okuloj. Ho Dio, tie ŝi estis, jen denove, ŝi traktis la saman antaŭan ludon. False – false kiel ĉiam. False kiel, kiam ŝi skribis al Nancia Pym. False eĉ, kiam ŝi estis sola kun si, nun.

Kiel tiu kreaĵo en la spegulo rilatas al ŝi, kaj kial ŝi fiksrigardis? Ŝi faligis sin al unu flanko de sia lito kaj kuŝigis sian vizaĝon en siajn brakojn.

“Ho,” ŝi kriis, “mi estas tiom malfeliĉa – tiom terure malfeliĉa. Mi scias, ke mi estas stulta kaj spitema kaj orgojla; mi ĉiam aktoras en rolo. Mi neniam estas

mia vera memo dum momento.” Kaj klare, klare, ŝi vidis sin kuranta supren, kaj malsupren, laŭ la ŝtuparo, ridanta apartan postlasantan ridon, se estis vizitantoj, staranta sub la lampo se viro venis por vespermanĝi, por ke li vidu la lumon sur ŝia hararo, paŭtanta kaj ŝajniganta, ke ŝi estas eta knabino, kiam oni petis, ke ŝi ludu la gitaron. Kial? Ŝi eĉ daŭrigis tion celante al Stanleo. Nur lastan nokton, kiam ŝi legis la ĵurnalon, ŝia falsa memo staris apud li kaj intence apogis sin kontraŭ lia ŝultro. Ĉu ŝi ne metis sian manon super lia, montrante ion ajn, por ke li vidu, kiel blanka ŝia mano estas kontraŭ lia bruna mano.

Kiel malestiminde! Malestiminde! Ŝia koro malvarmis per furiozo. “Estas rimarkinde, kiel vi daŭrigas ĝin,” ŝi diris al la falsa memo. Sed tio estis, nur ĉar ŝi estis tiom malfeliĉa – tiom malfeliĉa. Se ŝi estus kontenta, kaj estris la propran vivon, ŝia falsa vivo ĉesus ekzisti. Ŝi vidis al la vera Berila – al ombro ... ombro. Pale kaj malforte ŝi brilis. Kio estis de ŝi, krom la brilo? Kaj por kiuj etaj momentoj ŝi vere estis si. Berila povis memori preskaŭ ĉiujn el ili. Je tiuj tempoj ŝi jam inklinis: “Vivo estas riĉa kaj mistera kaj bona, kaj ankaŭ mi estas riĉa kaj mistera kaj bona.” Ĉu mi iam ajn daŭre estos tiu Berila? Ĉu mi estos? Kiel mi povos? Ĉu iam estis tempo, kiam mi ne havis falsan memon? ... Sed ĵus, kiam ŝia penso atingis tion, ŝi aŭdis la sonon de malgrandaj paŝoj kurantaj laŭ la pasejo; la porda tenilo klakis. Kezia eniris.

“Onklino Berila, Panjo diras, ĉu vi bonvolos malsupren veni? Paĉjo jam estas hejme kun viro kaj tagmanĝo estas preta.”

Ĝenaĵo! Kiel ŝi jam ĉifis sian jupon, kiam ŝi genuis en tiu idiota maniero.

“Tute bone, Kezia.” Ŝi transiris al la tualeta tablo por pudri la nazon.

Ankaŭ Kezia transiris, kaj malŝtraŭbis etan poton de vizaĝa kremo kaj elflaris de ĝi. Sub sia brako ŝi portis tre malpuran ŝtofan katon.

Kiam onklino Berila kuris el la ĉambro, ŝi sidigis la katon supre sur la tualeta tablo kaj metis la kovrilon de la poto de vizaĝa kremo sur ĝian orelon.

“Nun vi vidu vin,” severe diris ŝi.

La ŝtofa kato tiom embarasiĝis pro la vidaĵo, ke ĝi malantaŭen forfalis kaj ripete skuiĝis ĝis la planko. Kaj la kovrilo de la krema poto flugis tra la aero, kaj ruliĝis kiel monero rondirante sur la linoleumo – kaj ne frakasiĝis.

Sed por Kezia, ĝi jam frakasiĝis en la momento, ke ĝi flugis tra la aero, kaj ŝi reprenis ĝin, sentante sin varma, kaj remetis ĝin sur la tualetan tablon.

Tiam ŝi piedpinte foriris, multe tro rapide kaj gravmiene. ...
